

BEOGRADA VERDA STELO

Jaro I	Beogrado, septembro-decembro 2006	n-ro 1
--------	-----------------------------------	--------

Kara leganto

Jen, en viaj manoj estas la plej nova revuo de la serba esperantistaro. Pasis jaroj, eĉ jardekoj, de kiam ni restis sen ia ajn komunikilo en internacia lingvo – *Esperanto*, kiel viva lingvo, kies historio montras la sintezon de multaj hindeŭropaj radikoj kun konstanta intenco pliriĉigi sian leksikon per afiksoj (prefiksoj kaj sufiksoj).

La ideo pri publikigo de tiu ĉi revuo ekestis inter beogradaj esperantistoj por utiligi precipe al gesamideanoj en Serbio. Aliflanke, la plej grava avantaĝo de la lingvo Esperanto estas ankaŭ en konversaciaj kaj skribaj rilatoj inter homoj de ĉiuj meridianoj.

La neceso por eldonado de *nia revuo* – interalie – estas pli bona praktiko de la lingvo en multaj kaj diversaj kampoj:

- *historio de Esperanto*,
- *Esperanto-instruado*,
- *lingvaj demandoj*,
- *Esperanto – kurso*,
- *Esperanto – literaturo: poezio, prozo, eseo (originala aŭ tradukita), ŝercoj, anekdotoj kaj enigmoj*,
- *novaj libroj-recenzoj*,
- *Esperanto-kongresoj kaj aliaj okazaĵoj*,
- *interesaĵoj, opinioj kaj sugestoj*.

Donante al vi, kara leganto, la unuan numeron de *Beograda verda stelo*, kun la prezentita enhavo, ni atendas viajn proponojn, en la formo *leteroj de legantoj*, kiujn oni povas aldone publikigi.

Ni bonvenas kunlaboron!

La ĉefredaktoro

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumentoj
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)
Aperas trifoje jare

Ĉefredaktoro: d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana Šundeka, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

Originala prozo

Dimitrije Diso Janičić

KAVALIRA ANATEMO

Neniu scias pri iuj misteroj de ĉi tiu mondo. En nia ĉirkaŭaĵo ĉiu arbo, ĉiu roko havas siajn rakontojn, gardis siajn misterojn, bonon aŭ malbonon, benojn aŭ anatemojn homajn.

Tia estas ankaŭ la rakonto pri la kverko. Ĉu kverko estas sankta arbo – mi ne scias. Kiu tion scias?! Sed, en ĝi estas forto kiun ne havas ceteraj arboj. Kiam oni metas manon sur ĝian krudan kruston, kvazaŭ oni sentas vivajn sukojn, kaj ĝi tenas per radikoj firme la teron. Pro tio ĝi aspektas tiel memstare kaj firme.

La rakonto pri ĉi tiu kverko estas rakonto pri kavalira anatemo. Tiu anatemo akompanis ĉi tiun arbon de antikvaj tempoj, centojn da jaroj la arbo portis la anatemon“ sur sia forta dorso. La anatemo, intertempe, fariĝis por la kverko – beno. Neniam oni rompjis ĝiajn branĉojn, neniam ĝin hakilo vundis, neniam fajro bruligis ĝin.

* * *

Tio estis la epoko post la Granda batalo. Suna, sennuba aŭgusta tago. La suno ardis. Nenie spireto de freŝeco. Kavaliro Rade revenis vundita kaj laca. Lin akompanis servisto. Kuniris ankaŭ famo pri la malgajnita batalo, kaj konstanta elfluo de sango el la vundo. Kreskis en li senforteco. Li sentis alproksimiĝon de la morto.

La kavaliro foriris en batalon antaŭ tri monatoj. La caro alvokis kavalirojn sub militan flagon. Malamikoj estis atakantaj. Oni devis defendi la patrujon. Kavaliro Rade ekiris kun granda eskorto, brilaj bataliloj, en kavalira kiraso per oro ornamita. Li ekiris por venki. Kaj nun li revenis vundita kaj laca. Venkita.

La kavaliron adiaŭis patrinaj, fratinaĵoj kaj edzinaj larmoj. Lin adiaŭis malgajaj rigardoj de la plej karaj. Al ili trois militoj kaj bataloj, trois perdoj de la plej karaj. Sed, neniu ilin demandis. Tamen, kavaliroj estas kavaliroj kaj tial ili devas batali. Ili ne povis lasi honton fali sur iliajn batalilojn.

Atakantoj venis el malproksimo. Oni teksis pri ili teruregajn rakontojn apud fajrujoj, kreskis timo de la aŭskultantoj. Sed kreskis ankaŭ la kavalira fiereco: malamikoj ne pasos apud ili dum ili vivas.

La kavaliroj forrajdis. Tagoj pasadis. La printempo en someron transformiĝis. Kverkoj ŝanĝis siajn vestaĵojn. Herbaĉo kreskis sur vojoj. Grizajn rokojn kovris verdaĵo de arbustaro. Ĉio ekfloris. Timo enloĝiĝis en animojn. Sed tristeco en homaj koroj ne influis la naturon. Ĝi iris siajn vojojn, ĝi ripetadis la malnovan, jam pratempe ellernitan lecionon.

En somero pro sufoka varmo floroj velkadis, kverkoj densigis branĉarojn, kaj de malproksime oni aŭdis kontraŭdirajn novaĵojn pri malvenko de militistaro. Sed la espero ne mortis. Iluza ŝajno ke la novaĵoj estas falsaj, nutris atendadojn, prokrastis fuĝadon. La virinoj nokte kaŝe elverŝadis larmojn pro la plej karaj, malplektadis siajn hararojn.

En aŭgusto oftigis onidiroj. Unuaj vunditoj komencis alvenadi. Rifuĝintoj nokte pasis per vojoj, serĉante lokojn kie ili povus denove konstrui siajn hejmojn.

Iun aŭgustan tagon matene sur la kampo aperis kavaliro Rade. Grave vundita. Servisto akompanis lin. La iam brila kiraso nun pendis difektita sur la servista mulo. La kavaliro apenaŭ tenis sin sur la ĉevalo.

Ili devojiĝis. La servisto kuŝigis la kavaliron sur herbon sub iu juna kverko. Li ripozis tie. La servisto denove lavis kaj bandaĝis liajn vundojn. La ĉevaloj paŝtiĝis apude.

Lin kaptis febro. En lia kapo miksiĝis realeco kun sonĝoj, bildoj pri batalo kaj la hejma fajrujo, pri karesoj de Kosara kaj razitaj kapoj de malamikoj kiuj fontis en kontinua serio svingantaj per sabroj kaj kriantaj iujn fremdajn kaj nekonatajn vortojn el kiuj radiis malamo. De tempo al tempo revenadis mallumo de forgeso kiu lin kovris kiam lin rosis sango pro bato de glavo. Li falis kaj restis inter mortintoj. La glavo restis rompita sur batalkampo.

Li vekiĝis inter mortintoj. Rabobirdoj festis jam sian sangan bankedon. La servisto serĉis kaj trovis lin. Li lavis lian vizaĝon, bandaĝis liajn vundojn kaj forportis lin de batalkampo. Sur la batalkampo la soifa tero trinkis sangon. Ĝi ne diferencis amikojn de malamikoj.

La kavaliro kun sia servisto rajdis multajn tagojn. Li estis falinta kaj denove ekstaris. Persiste. Unu foje, du foje, multajn fojojn. Ĝis la forto lin tute forlasis. Li ne povis pluen. Ombro de juna kverko, alta herbo, la fonto – altiris lin.

Sed la vundo bluiĝis, febro nebuligis lian rigardon, elĉerpis lian forton. Li antaŭsentis proksiman finon.

En miksaĵo de realo kaj malrealo, febraj revoj kaj mallongaj lucidaj momentoj – li pretigis sin por la lasta vojaĝo. Sian ornamaĵon la kavaliro transdonis al la servisto por forporti al la edzino Kosara. La kavaliro ordonis al sia servisto elfosi tombon ĉi tie – apud la vojo, sub la kverko. Ĉi tio estos kavalira eterna hejmo.

Bonfaranta kverka ombro ŝajnis al la kavaliro kvazaŭ Dia donaco. Li rigardis ame la junajn kverkajn branĉojn.

– Estŭ malbenita ĉiu kiu rompos branĉon de ĉi tiu arbo! Se iŭ branĉon rompos nokte – li ne vidu la aŭroron! Se branĉon iŭ rompos matene – li ne vidu la vesperon! Atingu lin mia puno: li kuru sed ne povu forkuri, li deziru sed ne povu plenumi siajn dezirojn! Li mortu ne vidante sian hejman fajrujon kaj siajn plej karajn! Tio al li estu la lasta tago! Ne vidu li siajn infanojn! Estu malbenita! Estu malbenita! – kriegis li en febro.

La kverka foliaro susuris kvazaŭ ĝi aprobadus liajn vortojn.

La servisto trankviligis lin, malvarmigis lian frunton per malseka tolo, lavis al la kavaliro la inflamitan vundon. Li ĉiam pli malfortiĝis, sed en liaj vortoj estis granda potenco, nerealigitaj deziroj, netravivita vivo.

– Estu malbenita! Estu malbenita tiu kiu rompos branĉon de ĉi tiu arbo! – li murmuris. Obeu miajn vortojn! – li ĝemetis.

La servisto kruccsignis timigita per la forto kiu radiis el tiuj kvazaŭ instinkte diritaj vortoj.

Malfrue tiun posttagmezon alvenis iu vilaĝano. Li alportis kuracajn herbojn. La kavalira rigardo klariĝis. Li trinkis kelkajn glutojn da akvo.

– Kial vi malbenis? – demandis la servisto.

– Neniŭ akceptis min kiel ĉi tiu kverko. Ĉu vi ne vidas ke ĝi fleksas branĉojn por ŝirmi min de la suno? Mi deziras ke vi entombigu min sub ĉi tiu kverko. Kiam pasos centoj da jaroj, kiam ĉi tiu kverko estos la plej granda arbo en la ĉirkaŭaĵo – oni nomu ĝin – kavalira kverko. Mia anatemo estu rakontata kaj transdonata de generacio al generacio. Tempo ŝanĝiĝos, homoj ŝanĝiĝos. Pri Granda batalo restos nur legendoj. Malamikoj kiuj nin venkis – devos foriri. La kverko estos protektita per mia anatemo kaj travivos. Ĝi travivos jarcentojn kaj tiamaniere vivos ankaŭ la rakonto pri mi! – diris kavaliro.

– Rakontu pri mia anatemo al viaj infanoj! – li turniĝis al la vilaĝano. – Viaj infanoj rediru ĝin al siaj infanoj!

– Mi faros kiel vi diris, kavaliro! – modeste murmuris la vilaĝano. Sed vi fartos pli bone, vi resaniĝos!

– Ĉi tio ne estas resaniĝo! Ĉi tio estas adiaŭo – diris la kavaliro kaj eksilentis. Poste li denove falis en febron el kiu li ne vekiĝis.

Homoj enterigis lin sub la kverko.

La kverko kreskis kaj disvolviĝis. La kavalira anatemo ripetiĝis de generacio al generacio. Ĝi vivas ankaŭ nun. Dum centoj da jaroj neniuj tuŝis la branĉojn de la kverko. Ĝi estis protektata per kavalira anatemo.

Tempoj ŝanĝiĝis. Monarkoj naskiĝadis kaj mortadis. Malamikoj kun kiuj batalis kavaliro Rade – foriris. Novaj generacioj naskiĝis kaj mortis.

Nur la kverko staras, netuŝita, sendifekta, pli forta kaj pli potenca. Birdoj sur ĝi ne konstruadis nestojn. Fulmo ĝin ne frapadis. La Granda batalo estas priskribita en historio, sed la legendo pri kavalira kverko kvankam nenie enskribita – vivis en koroj de homoj en proksimo de tombo de la kavaliro“. Homoj timis la kavaliran anatemon.

* * *

Estas strange, sed la rakonto konfirmiĝis en nia tempo.

Antaŭ okdek jaroj venis novaj okupantoj. Fremda militistaro konstruis vojon tra la vilaĝo kaj starigis fortikaĵojn sur montojn. Ili tendumis proksime al la kavalira kverko.

Foje iu soldato per hakilo eksvingis al la kavalira kverko. Vilaĝaj infanoj kun teruro diskuris. Ili konis kaj estimis la kavaliran anatemon. La soldato ekmiris pri la forkuro de la infanoj kaj lasis la hakilon. Li kolektis sekajn branĉojn sub la kverko. Kolektinte plenan faskon, li kunportis ĝin kontente al siaj kamaradoj.


Li ne komprenis la infanan teruron! Li fajfetadis iun melodion el sia naskiĝloko. Apud la kuireja fajro li stumblis. Li malbone paŝis, aŭ staris sur laĉeton de sia ŝuo – kiu scias. Ĉiukaze li falis sur la branĉaron. Iu pinta branĉo pikis lian faringon. Li eĉ "ve" ne diris. Li estis mortinta antaŭ ol liaj kamaradoj alkuris al li. La kavalira anatemo atingis lin post tiom da jarcentoj.

Tial de tiu kverko neniun branĉon oni tranĉas, ĝin fulmo ne frapas, birdoj sur ĝi ne faras siajn nestojn. Ĝin protektas la kavalira anatemo.

Nuntempe apud la kavalira kverko vilaĝanoj renkontiĝas. Homoj tie sidas kaj interkonsiliĝas. Kiam ili trinkas tiam ili verŝas parton de trinkaĵo sur la teron – kiel ofero al la mortinta kavaliro.

* * *

Ĉu tio estas – ĉu ne estas vero – kiu scias. Neniu kuraĝis tion esplori. Cetere, neniu scias ĉiujn misterojn de ĉi tiu nia mondo. Arboj kaj arbaroj, rokoj kaj kampoj havas siajn misterojn, ili gardas bonon kaj malbonon, homajn benojn kaj anatemojn. Ĉiu arbo estas rakonto. Ĉiu roko. Ĉio ĉirkaŭ ni havas sian rakonton. La rakonto pri kavalira kverko – estis nur unu el ili. (*Laureato LIRO 1999, La Ondo de Esperanto*)



Originala poezio

Jen unu poemo en du lingvoj:

Dimitrije Diso Janičić:

ПЕЧАТ

Над књигом В. Пиштала: *Тесла, младост*

STAMPO

Legante la libron de V. Pištalo TESLA - JUNEKO

Замишљао је природу као велику мачку
питајући се: Ко је милује правећи муње.

Li enpensis la naturon kiel katon
demandante sin: Kiu karesas ĝin farante fulmon.

Учио је у Смиљану да бира мисли
како би схватио унутрашње дисање ствари.

Li lernis en Smiljan elekti pensojn
por kompreni la internan spiradon de objektoj.

Проналаске је видео као ширење света,
инспирацију као удар муње,
а откриће као божји пољубац.

Inventadon li vidis kiel plilarĝigon de la mondo
inspiron – kiel frapon de fulmo
eltrovon – kiel kison de Dio.

Док је у библиотеци – једином месту извесности
смиривао мрежу устрепталих нерава,
жудео је за оним чега се бојао
претварајући усхићење деструкције
у стваралачко трајање.

Dum en biblioteko - unika loko de certeco –
li kvietigis la reton de tremantaj nervoj
li deziregis tion kion li timis

transformante la ekstazon de detruo
en kreeman daŭron.

Пио је или се коцкао
до јутарње звезде која је отварала капију ноћи
бежећи од озарења
која су љуљала стабилност свакодневице

Li trinkis aŭ hazardludis
ĝis aŭrora stelo kiu malfermas la pordegon de l' nokto
fuĝante de radiado
kiu lulis stabilecon de l' ordinara vivo

Јутро га је враћало у реалност
у којој је припитомљавао непознате пејзаже
уграђујући их у своју самоћу генија.

Mateno lin revenigis en realecon
kie li malsovaĝigis pejzaĝojn
brodtekstinte ilin en sian solecon de genio.

Онда се отиснуо у бескрај снова
претварајући их у стварност
и трчећи за својом звездом
стигао у вечност дајући јој свој печат.

Tiam li forŝoviĝis en senlimon de sonĝoj
transformante ilin en realecon
kaj kurante al sia stelo
alvenis en eternon donante al ĝi sian stampon.




ĜOJIGA NOVAĴO

Ĝojiga novaĵo, sur nia ĉielo
jen, baldaŭ aperos nia "Verda Stelo"
Kaj, kvankam ni jame la vintron enenas
ĉi bela novaĵo balsame alvenas!
Delonge ni mutis pro batoj de l' sorto
vegete nur vivis esperanta roto
Modeste ni restis sub ĝia milda helo
post la estingiĝo de la "Suda Stelo".

Vane ni klopodis kaj la fortoj pretis
ne multon atingis, eĉ se helpo petis,
ne miru vi multe pro la stato tia
diversspecigita estas rondo nia
de nia membraro ne multas la nombro
de l' homarplimulto, ni estas nur ombro
sed nobla ja estas esperanta celo
kompreno, fratiĝo, paco estad-belo...

Do, ĉiuj apogu nian "Verdan Stelon"
laŭ viaj kapabloj vi ĉizu la belon
ne nur per kritiko oni skurĝu verkon
aŭ eĉ nenaskiton jam ĵetu en ĉerkon.
Vi helpu amike, vi ne ŝparu forton
kaj rezulto bona, montros nian forton.



Tradukoј

Десанка Максимовић

НИКОЛИ ТЕСЛИ

Како је могуће,
творче земних сунаца и месечина,
рођаче Перуна и громовник-Илије,
који си ишао од људског несна до несна,
светлећи док се формула сазвежђа не срачуна,
док се не забележи тек рођена песма,
како је могуће да и тебе тама скрије?

Зар је и тебе,
који си крао огањ васионе,
који си осветљавао по беспућу лађе,
пунио блеском концертне дворане,
гњурао руке у матице озона,
морала судбина других да снађе!

Ти који си у свакоме крај нас пламу,
свакој жаруљи муње обасјању,
зар ниси могао помрчини утећи?
Зар и ти који си крај нас разгонио таму
мораде у њу лећи?

Зашто те не сахранисмо у санте поларне
где су и ноћи светле и беле,
па би и мртав лежао у сјају,
па би кад ти зрак месечине и сунца
биљурни ковчег дарне,
муње се око тебе разлетеле!

Desanka Maksimović

AL NIKOLA TESLA

Kiel povas esti,
vi, kreinto de sunoj kaj lunoj teraj,
parenco de Perun¹ kaj fulma Eliaso²,
dank' al kiu lumiĝis laŭvice ĉiu ombro,
kiu brilas ĝis finkalkulo de formuloj stelaj,
ĝis finverko de poemoj grandnombro,
kiel povas esti ke eĉ vin nigro kovras?

Ĉu ankaŭ vin,
ŝtelanton de l' universo fajron,
kiu per helo gvidis ŝipojn tra maro,
lumiganton de muziksalonegoj,
kiu ŝovis ozonokernen la manon,
devis trafi la sorto de tuthomaro!

Vi, kiu enas apud ni en ĉiu artsuno,
ĉiuampole fulme lumigante,
kial ne povis de nokto ŝirmiĝi?
Ĉu eĉ vi, dispelanto de mallumo
devis en ĝin kuŝiĝi?

Kial ne enfosis sur poluson glacian
kie eĉ noktoj helas kaj blankas,
por ke vi eĉ morta en brilo restu,
por ke lun- aŭ sunradio kiam
kristalan ĉerkon vian tuŝas,
fulmoj ĉirkaŭ vi ĉiam ekestu!

Tradukis: Agnesa Eremija



¹ Ĉefa dio laŭ la malnovslava mitologio

² Tiu sanktulo – laŭ la popola kredo – ĵetadas fulmojn sur la Teron

Микола М. Кочиш
(1928 -1973)

МИ ТУ НЄ ГОСЦИ

Оголєли зме перши нашей матки ровніни
и цицаме јак чада сок животворни, богати
приросли зме за ню
јак верба ґу беґєлю,
јак топя ґу долїни,
приліпли ґу ней нашо думи
и мриї,
нашо жаданя и песци ґузловати.

Родза нас мацери нашо
у житних одкосох јак препилчата,
котуляме ше з кукурицох високих
јак бундави у богатеј єшенї,
рошнєме на теј ровніни богатеј
јак несташни гачата,
јак густа щец,
јак младнїки баґрени до жени масней
пущаме свойо коренї...

Оголєли зме перши нашей матки ровніни
и, притулєни ґу ней, коренї свойо пущаме,
були зме госци,
странци,
на цудзим,
без оцовщини,
а тєраз братом з далєка
свой дом з гордосцу отвераме.

NI ĈI TIE NE ESTAS GASTOJ

Ni nudigis brustojn al nia eben' patrino
kaj suĉas kiel idoj vivigan, riĉan sukon,
korligiĝis kun ĝi
kiel salik' kun kanalo,
kiel poplo kun la valo,
algluis al ĝi niajn pensojn
kaj songojn,
niajn dezirojn kaj tuberajn pugnojn.

Naskas nin patrinoj niaj
je grenaj falĉaĵoj kiel koturnidojn,
ruliĝas ni de altaj maizstangoj
kiel kukurboj dum riĉa aŭtuno,
kreskas en la donacema ebena
kiel petolaj ĉevalidoj,
kiel densaĵo,
kiel akaci-markotoj, en grasan teron
enigas ni niajn radikojn.

Ni nudigis brustojn al nia eben' patrino
kaj, algluitaj al ĝi, kreskigas niajn radikojn,
estis ni gastoj,
fremduloj,
en fremdejo,
sen patrujo,
kaj nun al foraj fratoj
fiere malfermas niajn domojn.

Simo Matavulj (1852-1908)

**BAKONJA FRAT'-BRNE
(Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

Simo Matavulj (1852-1908)

**BAKONJA FRAT'-BRNE
(Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

Estimataj gelegontoj,

Traduki romanon kia estas "Korpulentulo frat'-Brne" ne estis facila tasko. Ĉi-libro abundas je dialektaj formoj, ĝi estas mia opinio, unu el la plej malfacilaj traduke, sed laŭ la enhavo kaj originaleco – unu el la plej interesaj kaj la plej allogaj verkoj.

La gravajn kromnomojn mi tradukis en Esperanton. Kial? – Por ke oni povu senpere kapti la sencon de tiuj esprimoj, sen iu komento. Vere, mi klopodis eviti la komentadon, kaj ĝi sekve preskaŭ ne ekzistas en la traduko. Kelkajn negravajn kromnomojn mi lasis en originalo. Krome, en originalo restis ankaŭ du-tri gravaj kromnomoj, ĉar mi ne povis kapti ilian devenon.

Koncerne la versojn kiuj enestas, mi sukcesis ilin traduki same laŭ rimoj.

La dialektan nomon de s. Francisko mi lasis en originalo – s. Frane.

Mi tradukis ĉi-tekston jam delonge, sed ne aperis ĝis nun tutkonvena okazo por publikigi ĝin libroforme.

La iam tajpita provteksto havas plurajn tajperarojn kaj mi klopodis forigi ilin dum la nuna finordigo.

La tradukinto

BAKONJA FRAT'-BRNE

I.

LA SANKTA GENTO

Dalmatio havas: ses episkopojn, kvar mitroportajn abatojn, ses konsistoriojn, dek teologiajn seminariojn, kvardek presbiterojn, ducent naŭdek sep parokojn, cent tridek tri kapelojn, sepdek tri monakejojn kaj en ili ĉirkaŭ du mil kvincent monakejanojn.

Dalmatio posedas ĉirkaŭ kvarcentmil katolikajn popolanojn; ĝi estas malriĉa, sekve ĝiaj idoj vagegas je ĉiuj partoj de la mondo por la bezonata pano, kaj kiu tion scias tiu dirus ke ĉi tiu dia vinberejo havas, laŭ grundspaco kaj vitnombro, eĉ tro da laboremuloj. Sed la pliparto de dalmatoj eĉ hodiaŭ plendas kontraŭ francoj, kiuj komence de ĉi-jarcento malekzistigis ankoraŭ tiom da episkopejoj, abatejoj, konsistorioj, presbiteroj, parokoj, kapeloj, monakejoj kaj preĝejoj.

Kiel multaj dalmataj triboj fieras je siaj herooj en la pasinteco, kiuj distingiĝis en la militoj kontraŭ turkoj, samtiel multaj triboj fieras je siaj "mesistoj" batalintaj kontraŭ la "malfidelaj ortodoksulaĉoj"; kiel en Dalmatio ekzistas frataroj deveninigitaj en la kontinua vico eĉ tridek-kvardek dukojn, standardistojn, ktp., samtiel ekzistas tiaj el kiuj devenis tiom da fratoj aŭ pastroj (frato estas pli estimata).

Tiaj triboj nomiĝas: LA SANKTAJ GENTOJ.

Tiela estas la sankta gento de JERKOVIĆ en Zvrljevo, kiu, ĝis nun, liveris al la monakejo V. dudek kvin fratojn.

Ekzistas unu libro havanta biografiojn de ĉiuj fratoj - Jerković ĝis mezo de ĉi-jarcento, de ili dudek tri. Mi estis feliĉa ke mi havis tiun libron en la manoj dum kelka tempo kaj notis el ĝi pli gravajn informerojn pri kelkaj ĉefaj fratoj – Jerković, sed ĉi tie mi indikos nur kvin notojn por ke la legontoj vidu la meritojn de tiuj viroj.

RIMARKO: La unua numero signifas la naskiĝaron, unu kruco signifas la jaron dum kiu oni fratiĝis, do kiam oni mortis por la mondo, kaj du krucoj signifas la jaron en kiu oni vere mortis, samkiel ni ankaŭ mortadas.

Jen tiuj notoj en la lingvo de Bunjevo, la samaj kiel en la menciita libro:

"FRAT'-BRNE II (++ 1519). Li konvertis plurajn el la malnova testamento en la katolikan religion, kion tre favoris: E. Moĉenito, provizisto en Zadar, T. Pilotić, kapitano ..., R. Patak, standardisto en ..., kiel atestas unu enskribaĵo de la mano de la sama frat-Brne, en kiu dirita

enskribaĵo (el la jaro 1502 je la malnovslava alfabeto, je kiu oni havas ankoraŭ multajn enskribaĵojn) la dirita f. B. rekomendas al pastroj post si mem ke ili menciadu dum malgrandaj mesoj la nomojn de tiuj viroj... Ankoraŭ oni rakontadas en Zvrljevo ke li bele kantis akompanate de guzlo, kiel ortodoksuloj, kaj ke li povis alvoki homon je unuhora distanco, tiel fortan voĉon li havis”.

"FRAT'-MARTIN (1545, + 1565, ++ 1630). Li parokestris en Li fuĝis de turkoj dufoje transriveren... Li estis vundita perfusile de kristanoj... Ekzistas unu lia enskribaĵo: ke li iam ajn ne gustumis fiŝon, nek kuiritan nek rostitan, nek maran nek riveran, ĉar li ne povis ilin toleri, KIO ESTAS ĜUSTE STRANGA SEKRETO DE LA KARAKTERO!..."

"FRAT'-JERICA (1631, + 1652, ++ 1710). Li marŝvagegis en Kotor kiam la dukoj Janković kaj Nakić forpelis la turkojn... Li multe suferis pro la fuĝado, sed ankraŭ pli multe pro la malicaj kaj ruzaj homoj falskulpigintaj lin pri iu granda peko, pro kiu li estis eĉ punita. Liatempe mortis iu juna Jerković en la monakejo, kaj la alia Jerković-ido forfuĝis el la monakejo, kaj nur la tria pastrigis... Je la fino Jerković estis konfesionisto de la episkopo kiu lin multe amis..."

"FRAT'-BORTUL (1709, + 1729, ++ 1776). Ĉi-fama pastro, dum estis granda malsato, konvertis multajn familiojn el la greka en nian katolikan religion. Tial generalo de nia pastraro alvokis lin al Romo kaj prezentis al s. p. papo Klemento, kaj oni faris al li multajn honorojn, sed dumrevene, vojaĝante el Zadar surĉevale, li falis kaj rompis la kruron, pro kio li multe malsanis. Kiam denove ekestis malsato (1756), li luis grenon kaj vendis ĝin bone al popolo kaj per la enspezoj li aĉetis al la monakejo, en la supra parto, vinberejojn, kiuj valoras nun 30.000 f."

"FRAT'-VIĆENCO (1774, + 1793, ++ 1835). Post pereado de la princo, li iris kun la alia dalmata sinjoraro al la brila krono de Vieno por subigi Dalmation al caro, kiacele estis forsenditaj deputitaroj de la tuta Dalmatio. Li tagmanĝis kun la krono kaj interparolis kune... Kiam francoj malpermesis nian pastrordon, li restis sola en la monakejo ok jarojn, dum la aliaj pastroj disfuĝis en la parokojn... Tiutempe li multe suferis pro la kristanaj hajdukoj, kiuj tiam terure furiozis. Dum unu renkontiĝo la diritaj hajdukoj FORTRANĈIS LIAN DEKSTRAN ORELON KAJ LI RESTIS SEN ORELO ĜIS MORTO"...

Niatempe ekzistas deko da domoj de Jerković, sed jam delonge ili dividiĝis en tri branĉojn kiuj nomiĝas: RAPIDMANĜULOJ, DENTEGULOJ kaj MURMURULOJ.

Iu povis ekpensi, pro tiuj ĉi kromnomoj, ke Jerkoviĉoj estas malestimataj inter siaj samregionanoj, sed eĉ en Zvrljevo, neniu iun ajn nomas laŭ la vera nomo aŭ la vera antaŭnomo, sed ĉiu persono havas

ian kromnomon. Eĉ la fratoj mem, kavnkam ili estas post dio la plej respektataj, ne povas eviti tiun popolan bapton. Tio do simple estas kutimo, iu malbona kutimo se vi volas, kaj nenio alia. Ke la domo de Jerković estas vere de la popolo respektata kiel la sankta gento, oni havas aron da atestoj, sed ni elektos nur du-tri.

Unue, ne nur en Zvrlevo, sed ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo, se oni volas rakonti ion el la pasinteco, oni kutime aldonas: "Tio estis en la tempo de frat-Martin Rapidmanĝulo, aŭ frat'-Bortul Dentegulo, aŭ frat'-Vice Murmurulo," ktp. – ĝuste kiel bosniano diras: "Dum Kulin-banuso", kaj hercegovin-ano: "En la epoko de l' vojevodo Stefano!".

Due, Miluŝanoj, homoj tre "kaptemaj" (kiel oni diras tie pri ŝtelistoj) pli volonte "kaptos" al Jerkoviĉoj suĉbeston ol al alia sterilan ŝafon, konvinkitaj ke la viando de Jerkoviĉ'bruto estas multe pli bongusta ol viando de ies ajn alia bruto.

Ankoraŭ unu ekzemplo kaj sufiĉas. Antaŭ kelkaj jaroj interdisputiĝis unu Jerković kun iu najbaro. Estante kverelema Jerković frapis la najbaron, dume tiu havis enmane hakilon kaj eksvingis klingon al Jerković, sed subite ŝanĝis opinion kaj turninte la malklingon li frapegis Jerković-on sur frunton kaj mortigis lin. Demandita en la tribunalo kial li tion faris, li respondis: "Mi ja ne bedaŭras ke mi mortigis lin, sed neniam konsoliĝus se mi estus VERŜINTA LIAN SANGON, ĈAR ILIA SANGO PEZAS EĈ AL LA NAŬA GENERACIO"...

Jerković-raso diferencas laŭ multo de la ceteraj almigrintaj kaj praloĝantaj frataroj. Rapidmanĝuloj kaj Denteguloj estas plej ofte malgrandaj, kollongaj, ostegecaj kaj vilaj. Murmuruloj estas, plejparte, malgrandstaturaj, pufaj kaj barbnudaj. Ĉiuj Jerkoviĉoj havas grandajn dentojn kaj preskaŭ ĉiu estas iom larĝbuŝa, brunhara kaj grizokula. Ĉiuj estas tre spiritmalriĉaj (en evangelia signifo), pacamaj, frandemaj, kaj tre malmulte "kaptemaj".

Per si mem estas kompreneble ke inter Jerkoviĉoj estas plej distinga tiu branĉo kies pastro estas vivanta. Frat'-Vice (1774, + 1793, ++ 1835), tiu al kiu "la hajdukoj fortranĉis la dekstran oreilon kaj li restis sen orelo ĝis morto", apartenis al Rapidmanĝuloj. Rapidmanĝulo estis ankaŭ frat'-Brne (III), (1819, + 1838, ++ ?). Ĉi tiu lasta havis tri fratojn: Jero, Juro, kaj Baro, aŭ kiel oni en Zvrlevo ilin nomas: HIRTULO, HOKSTANGO, kaj NAZSONULO. HIRTULO – tial ke li estis tre vila, HOKSTANGO – pro tio ke li estis maldika kiel hoko, kaj NAZSONULO – tial ke li parolis tra la nazo. Ĉar en ĉi tiu jarcento, la sankta akto estis en la branĉo de Rapidmanĝuloj, kaj Hirtulo estis fratarestro, ni preparolos lin kaj lian familion aparte, en ĉi-dua ĉapitro.

II HIRTULO KAJ HIRTUL-IDOJ

Jero, Jozov Jerković, Rapidmanĝulo, Hirtulo, estis longkrura, havante kolon kiel ŝamo, la kapon tiel rondan kaj firman ke li povis per ĝi fagan breton disrompi. Liaj rufaj lipharoj ŝtopetis la naztruojn kaj atingis la orelojn. Per la dentoj li povis ekmordi floreneron, kaj per la manoj rompi firman sekbastonon. Li povis formanĝi rostitan dujaran ŝafon, sed trinki li povis malmulte. Malgraŭ ĉio ĉi li estis kvietulo, pro kio la malkorpulenta kaj malfortika Barica, lia edzino aŭ kiel oni nomis ŝin Vespulino (pro la verdaj okuloj), povis lin riproĉi laŭvole.

Hirtulo vivis plej bone inter la siaj kaj estis separita de la fratoj. Ĉar la riĉeco ne estas ĵetinda eĉ en la sankta gento, kaj ĉar estas sciinde kiomon homo devas havi por esti la plej riĉa en Zvrljevo, aŭdu kio estis lia:

El nemoveblaj bienoj Hirtulo posedis: domon, kun la ŝtonplata tegmento, dekkvin ulnojn longan; apud la domo tegmentaĵon; malsupre de la domo ĝardenon kaj dektaglaboran ŝtongrundon, kia estas la tuta grindaro en Zvrljevo; malsupre de monteto ĉirkaŭ dekkvin fosilojn da vinberejo kaj iom da kulturata barilaro. El moveblaj bienoj li havis: la edzinon Vespulinon, tri filojn, du filinojn, du bovinojn, dudekon da ŝafoj, du azenojn kaj unu grasigatan porkon.

Dum fekunda jaro Hirtulo povis nutradi sin per sia greno ĝis Kristnasko, sed de tiam ĝis la tago de la s. Petro li kontentigadis dombezonojn vendinte vinon, se ĝi abundis, vendinte lanon kaj krompanaĵojn, vendante fruktojn ĝustsezone, kaj lignojn dum la tuta jaro en la urbo. Krome, Vespulino teksadis tutajn tagojn kaj ĝia teksado estis bontaksata.

Jen kiel oni vivetis en la domo de Hirtulo dum fekunda jaro. Fakte iliaj bezonoj ne estis grandaj. Abundu ĉiam ĝriaĵo, je festotagoj iom da grasaĵo kaj iom da rekremento por trempi glutporcion; estu brunlano por kovri korpon – kaj sufiĉas.

Laŭ tio ĉi vi povas juĝi kiel vegetis Hokstango kaj Nazsonulo kaj ankaŭ ĉiuj aliaj Jerkovićoj. Sed la malriĉeco hontigas neniun, malpleje la sanktan genton.

Sed se la rikolto perfidis?

Se la rikolto perfidis, je dio, ankaŭ tiam oni sukcese vivetis. Vespulino teksadis tutajn tagojn kaj noktojn, la azenoj per ligno ŝarĝitaj kaj post ilin Hirtulo trotadis pli ofte al la urbo, kaj kio pleje gravis en tia mizero, Hirtulo kaj Vespulino kaj Hirtul-idoj maldikiĝadis enzone. Vere

dum malbona jaro frat'-Brne helpadis plejparte sian pli maljunan fraton, parte ankaŭ la du aliajn. Tion la pastreto faradis kiel bona viro, sed estis al tio ankaŭ unu granda kaŭzo, ne indas kaŝi. Ni jam diris, ke Jerkoviĉoj estas iom kaptemaj, kaj malsato estas malsato, dum homoj estas homoj, jen al la pastro ja preta honto, se li ne preventas la malbonon!

Nun ni transiru al tio estanta pli grava.

Hirtulo kvazaŭ estis la plej honesta el siaj samregionanoj. Ni diras: kvazaŭ estis, ĉar ni ne scias certe. Li ĵuris ke li neniam al iu ajn ŝtelis ion krom du kaprojn de la onkloj, eĉ tion antaŭ la edziĝo, kaj laŭ la instigo de la mortinta onklo Jureto;

Zvrljevo-anoj ĵuris ke li kulpas pri almenaŭ tridek grandaj kaj malgrandaj brutoj kaj ankoraŭ pri multaj monakejaj objektoj. Nun kiu povus tion juste finjuĝi? Vere estis troigado de ambaŭ flankoj. Kvazaŭ tiel opiniis ankaŭ la cara aŭtoritato, kaj preninte mezon kaj konsiderinte ke se homo estas Zvrljevo-ano, sed ne kaptis pli ol dekkvin bestojn, ke tiu homo ne superis limojn de la honesteco, kaj ke li povas esti vilaĝestro. Sekve, la aŭtoritato nomumis Hirtulon Zvrljevo-estro. Tiuokaze Zvrljevo-anoj diris: "Esti sanktulo facilas al tiu, al kiu dio estas patro!" Poste: "Frat'-Brne estas dio, kaj estas facile al vi, Hirtulo!"...

Ĝuste la pastro amis Hirtulon pli ol la aliajn fratojn aŭ ĉiujn parencojn, li amis lin "kiel pano vinon". Se vi nur sciis kiom da fojoj li manĝis kune, ĝuste kun li ĉe la sama tablo kiel en monakejo tiel en parokoj! Li ankaŭ vojaĝis kun li. Dufoje ili iris eĉ al Zadar! Li liberigis lin de la ŝuldo, ŝtonpaltigis lian tegmenton, aĉetis brutaron, lia rekomendo altigis lin al vilaĝestreco, ktp.

Hokstango, Nazsonulo, Manlamulo, Traserĉulo. Ronkulo, Nazkataro kaj ĉiuj ceteraj idoj de la sankta radiko enviis al Hirtulo tiom nek la manĝatan manĝaĵon, nek la iritan vojjon, nek la redonitan ŝuldon, nek la kovritan tegmenton, nek la ekkulturitan brutaron, nek la akiritan vilaĝestrecon, ĉion ĉi ili ne enviis al li tiom, kiom ion de Hirtulo esperatan.

Dume Hirtulo kaj Vespulino kortimis ke ilia espero ne realiĝos. Pri tio ili ĉiuvespere parolis, eĉ ĉiam pri la samo. Ne nur ĉiunokte ili ripetadis la samajn pensojn, sed ankaŭ la saman vicon da vortoj, tiel ke iliaj infanoj ellernis parkere tiujn interparolojn, ĝuste kiel iajn preĝojn.

Post vespermanĝo, la edzino komencadis:

-Kadukulo ne taŭgas POR TIO! Ne, fraĉjo, ne, ne, neniel! Tiel malforta kaj stulteta li nek scipovus al la onklo botojn purigi, nek povus akvon alporti, nek ĉambron balai, ankoraŭ malpli sonorigi dumaŭrore la SANAN MARION, ankoraŭ malpli piedakompani la onklon surĉevale ien ekirantan, eĉ malpli esti persalte ĉie, kie la pastroj perokule, kiel konvenas, je dio, al la plej juna lernanto! Ne, fraĉjo!

Se eĉ ne estus ĉio ĉi, sed ke oni lasu lin senagadi, nur por libron lerni, ĉu ĉi-dia bovido iam ajn libron ellernos? Kiun ja vi similas, diablen!

Post tiuj vortoj ekestadis silento kaj ĉiuj rigardoj ariĝadis je Kadukulo, kiu mallevadis la kapon, sciante bele ke li kulpas pro tio ke li venis en la mondon malforta kaj "stulta"...

Lia baptonomo estis Jozica. La patrino demando: "Kiun vi similas" estis vere sencohava. Jozica havis jam dektri jarojn, sed lia kapo estis ne pli granda ol bona piro, kaj krom kapo, la tuta cetera korpo, ankaŭ la ventro estis eniĝinta ĉe la spino, - do, mizera manpleno, pro kio oni nomis lin Kadukulo... Poste Hirtulo, unue suspirinte kiom eble, ĉi tiel ekparoladis:

-Korpulentulo, Korpulentulo, malfeliĉa infano! Vi povus ĉion kion Kadukulo ne povas vi ege povus se diablo ne estas turninta vin malen!... Korpulentulo, kol' al vi rompiĝu, ĉu vi forlasis la friponadon, ĉu vi volas iam ajn rekapti saĝon... Korpulentulo, tondro vin mortigu! Vi malbone finos, je pendumilo vi finos kiel neniu via! Vi estas pli konvena por hajduko ol por pastro, vi kvazaŭ centfoje estus kristansanga! Malfeliĉa infano! Malfeliĉa infano, tondro vin rompu!...

Dirinte tion, Hirtulo kutime eksplodegadis, sed Korpulentulo ne zorgis pri tio, sed disigadis la piedojn kaj rigardis "paĉjon" mokeme.

(daŭrigota)

СИЛАЗАК БОЖАНСТВА

Ох, како је дивно све то опет гледати!

У почетку сам вршио спознају тромог тела. Почео сам од десне руке. Прво сам покушао са палцем. Потом сам истраживао кажипрст. Па са еланом средњак. Онај четврти, безимени, вукао сам, све док се није зачуло пуцкетање. Најзад, исправљајући пети прст, звани мали, гурнуо сам га снажно унапред.

Како је само пријатно поново на лицу осетити рескост и свежину ваздуха!

Опет слушати како људи разговарају, премда још увек не разумем баш све..

Град ми се допада. Иако су прошле толике године, сунце је и даље горе, на истом месту, и лењо се вуче од истока ка западу. Ох, и овде дани и ноћи пролазе неповратно!

Јутрос сам био у музеју. Падала је киша, и још увек непрестано сипи. Данас није било много људи. Не толико колико у дану мог нестанка.

Тада, одмах по ширењу те вести, људи уздрхтали од радозналости, преплавили су музеј. Полиција је штитила улазна врата. Не нашавши никакав траг, никакав знак о евентуалној људској злоупотреби у виду крађе или обијања, она је током следећег дана пустила део оних који нису успели да уђу. Ипак, није било места за све.

Успео сам да уђем, мало касно додуше, али пре сутона. Многи су изненађено бленули у празан саркофаг у херметички затвореној витрини. Неки су желели да фотографишу ово чудо, али обезбеђење то није допустило. Многи су, штавише, пожелели да прескоче ограду од велура којом витрина са саркофагом беше окружена, али нити су то могли нити су то смели.

Када сам изашао на улицу, застао сам на тренутак крај северних врата. Ноћ је завладала градом. Тражио сам на ноћном своду звезду, која морепловцима показује север, и нашао је; била је друга у змајевој линији. Ипак из ноћи у ноћ, бивало ми је јасније да се и то променило.

Оно што ме је изненадило и зауставило на степеницама силаска, било је лажно и вијугајуће сазвезђе. Светлост на светлост на светлост и све то пламти над обзорјем, тачно изнад сивила удаљених градских купола.

Ни јутрос није било претерано много света у салонима на горњем спрату музеја. Неки су журили према парку који се налазио између музеја и станице метроа и у којем се наталожило опало лишће. Попео сам се на горњи спрат сав мокар, моја памучна кошуља била је натопљена водом. На степеништу и по ходницима, људи су разговарали на различитим језицима, од којих ни један није био мој. Врло слични у својој различитости по изгледу и изразу лица, кретали су се опрезно између експоната насилно измештених из свог времена у неко друго време, из своје првобитне атмосфере у неку другу и другачију, а све у циљу оживљавања одавно уништене прошлости.

Наивчине! После мог нестанка, други салон постаје све сиромашнији. Док посетиоци пролазе око празне витрине, ја стојим са стране, посматрајући их како као бубе гмижу по пространој сали. Одавно се угасио пламен у крилу брижљиво балсамоване мумије; одавно не откуцава било у комичној фигури мачке од бронзе; одавно је престао да сија сјај венца опточеног златом на драгуљу круне; одавно је изгубио сваки значај одрпани, а брижљиво увијени папирус са светим текстом.

Али чак ни толико се овде не схвата!

У шибљацима парка, где пијанци налазе уточиште, а интелектуалци се одмарају читајући, неко је у само свитање пронашао наго, већ укочено тело, ишарано филигранима росе и кише. Јасан прелом вратних пршљенова, насилно изобличење тела. Бледа, врло бледа кожа, од ситних убода црвена попут кармина. На трави лежи јефтин ручни сат који и даље ради као да се ништа није догодило.

После времена проведеног у музеју, одлучио сам да пођем у парк. У парку више није било никога, полиција је такође отишла не нашавши трагове. Седећи на дрвеној клупи, прстима сам бројао новац у кожном новчанику и миловао ликове на папирним новчаницама. Пролазници су ме гледали, баш као и ја њих. За неколико новчаница купио сам земичку са врућом кобасицом и криглу пива, и држећи све то у рукама, ишао сам даље готово не приметивши да сам одавно изашао из парка.

Као и музеј тако су и улице и тргови били преплављени људима, свакавим људима: смеђим, црним као угаљ или бледим; сви они су били обучени различито и шаролико; једни су журили, други се лењо вукли, једни застајали крај излога радњи и непомично буљили у њих, други су чекали аутобус.

Такви су, дакле, људи посећивали музеј, стварали гужву из дана у дан, и побожно, али не и понизно, покоравали се неписаном ритуалу. Таквим својим обичајем они су отимали мртвима могућност одмора, баш као што су раније отимали уморнима могућност да вечно почивају.

Ускочио сам у аутобус, један од ретких који није био црвене боје, попео се на горњу платформу, сео код предњег прозора и уживао у панорами зграда, омиљеног пејсажа градских људи. Колико год ме је раније подилазио гнев од људских речи, обузимала мучнина од њихових засенчених мисли док су хиљаде очију и гласова чекићали моје лежеће тело као какву златну плочицу, толико ми је пријало њихово истраживачко луњање по музејским салонима на другом спрату јер се моје тело тада мирно одмарало у луксузном стакленом кавезу.

Добро је опет покушати овладати собом. Сваким мишићем, мишљу, осећањем.

У почетку се догодило самоприхватање зрелог, девичанског тела. Следећег јутра полагао сам на сочну траву крај обале реке, жудан благе сунчеве топлоте.

Ах, змије су у праву. Довољно је једно убиство дневно!

Вечерашњи аутобус оставио ме је на јакој киши у близини кварта са уским улицицама. Од човека што се драо, купио сам новине. У њима сам видео фотографије неког човека и човечице, мени непознатих, али сигурно славних по људским критеријумима, затим слику музеја, па слике лешева пронађених у различитим парковима.

Око мене излози многих радњи весело су позивали муштерије преко изазовних слика нагих лепотица.

Прексиноћ сам прошетао по том кварту, поред тих истих радњи. Унутра, под светлошћу црвених лампи, стајала је неколицина мушкараца и пребирала по великим кутијама са часописима пуним слика голих жена. Ред сијалица мамио је моје кораке ка степеништу у дну радње, степеништу обојеном црном и црвеном бојом; њоме су били обојени и зидови па чак и под. Горе су се налазиле собе. Скинувши јакну, сео сам и кроз стакло гледао плес жене. Показала се у свој својој наготи.

Данас сам је опет видео. У радњи је владала конфузија. Већ два дана нико није видео газду. Он је, пре две вечери, пошао својој кући у коју није стигао. Полиција још увек није пронашла његово леш са разбијеним теменом; он у тишини, лежи на дну мора.

Плесачица, ипак, и даље ради. Она, кроз стакло, заносно плеше. Чим је сунце зашло, почео сам да је пратим до оближњег кварта са малим радњицама и одвратно шароликом масом људи. Право, па скретање десно, онда заокрет лево, напослетку још једном десно на мали трг са зградама од браонкасте опеке са флекама које је утиснуло време. У ресторану сам изабрао сто насупрот њеном.

Тек понека, ситна кап кише миловала је камени тротоар и тканину тенде којом је башта ресторана била наткривена.

Било је пријатно посматрати контраст између балзамне белине њеног младог ненашминканог лица и црних очију мачкастог сјаја, уоквирених коврџама валовите загасито смеђе косе.

Наручио сам оброк који се састојао од рибе са резанцима, маслина и других прилога. У сали ресторана, двојица полицајаца са изразом лица ловца који њуши плен разговарали су нешто са власником, док је келнер шетао тамо-амо између столова, с напором држећи послужавник

Смрачивало се. Издужена светлост косо нагнуте лампе истицала је плаветнило џинса, белину блузе, црноћу џемпера. Под њеном блузом две набубреле, кестенасте тачке посташе сазвежђа. Нагнуо сам се напред и закорачио ка њој.

Љубили смо се, влажно, спајајуће.

Прихватила је карту гестом уобичајене женске уздржаности. У једном, дакле, гесту садржани су истовремено учтивост, захвалност и опроштај.

После њеног одласка, вратио сам се за сто, сигурно безимено уточиште, где и даље сада седим, и замишљено призивам успомене. Добро је бити човек. Примати и давати. Туцати. И бити туцан.

Опипавам мишиће на грудима и рукама под памучном кошуљом. Чудно је како су људске кости тако ломљиве. У мени пулсира воља за радом. Али ништа ме не пожурјује. Хамсин је у праву. Сутра не постоји. Једино људи сматрају да је о њему вредно размишљати.

Само кад бих пожелео, могао бих да узберем ноћ. Хоћу ли икад то желети?

Имам времена.

са есперанта превео:
Златоје Мартинов



Danilo Kiš, el "Enciklopedio de mortintoj":

GLORAS POR LA PATRUJO MORTI

Kiam tiun aprilan mateniĝon – kaj tio estis per imperiestra dekreto fiksita tago de lia egzekuto – gardistoj eniris la karceron, la juna Esterhazi estis surplanke genuanta kun firme porpreĝe premitaj manoj. Lia kapo estis malalte klinita, kaj la hela hararo faladis flanke, malkovrinte longan, sveltan kolon kaj ostozan spinon, kiu perdiĝis sub senkoluma lina ĉemizo. La gardistoj haltis unu momenton, konsiderante la interparolon de grafo kun Dio sufiĉa kialo por forgesi dum unu momento la severajn regulojn de la hispana rito. Ankaŭ la pastro dorsenpaŝis, premante silente siajn por preĝo kunligitajn manojn; liaj manplatoj ŝvitis kaj lasis perfidintan spuron sur eburaj kovriroj de la breviero: la olivgrandaj rozarieroj neaŭdeble pendolis. Nur surringegitaj ŝlosiloj en la manoj de unu gardisto sonoretis du – tri foje sen ia ritmo.

"Amen", ekflustris la junulo, fininte sian matenpreĝon. Poste li laŭte aldonis: "Pardonu, patro."

Je tiu momento, kiel laŭkomande, ekbruegis tamburoj, malbonaŭgure kaj sennuance, simile al pluvo.

Iu ruĝvizaĝa husaroficiro kun hirtigitaj lipharoj, enkadrigita per longaj pafiloj de du flankenstarantaj kroataj ulanoj, komencis legi la verdikton. Lia voĉo estis raŭka, kaj la karcerero kave resonadis. La verdikto estis severa kaj malpardonema: morto per pendumo. La juna nobelo kun armilo en la mano partoprenis iun el tiuj plebaj ribeloj kiuj de tempo al tempo skuadas la imperion, elrompiĝinte subite kaj neantaŭvideble, sangaj, kruelaj kaj senesperaj, por ke ili baldaŭ poste estu samtiel subite, kruele kaj senespere subpremitaj. Lian devenon kaj la gloron de lia familio la tribunalo estis preninta kiel pligraviga cirkonstanco kaj kiel perfido ne nur kontraŭ la monarko, sed ankaŭ kontraŭ lia propra klaso. La puno devis esti ekzempla.

La kondamnito apenaŭ komprenis iun vorton el la amaso da monotonaj silaboj kiuj bruegis en liaj oreloj kiel tambursonoj. La tempo estis haltinta. Pasinteco, nuntempo kaj futuro estis intermiksitaj, tamburoj bruadis kaj en liaj tempioj resonadis kiel maltrankvilaj arterioj, foraj sonoj de venkaj bataloj, triumfaj procesioj kaj sturmoj, kiel bruado de iuj aliaj, nigretegitaj tamburoj, sed kiuj tiam ne antaŭvertadis lian morton, sed tiun de iu alia. Spite al siaj jaroj (li pli similis frue altekreskintan knabon ol maturan junulon), li jam vidis vundojn kaj staris okulo al okulo kun la morto, sed neniam ankoraŭ tiamaniere, de ĉi tiu proksimeco. Kaj ĝuste ĉi tiu proksimeco, ĉi tiu sento de mortospiro sur sia nuda kolo, ĝuste tio estis eltordiganta en lia konscio la

bildon de la realeco, same kiel al astigmatismulo la proksimeco de la objekto ankoraŭ plie deformadas la konturojn de la aĵo. Tio kiu nun sole lin gravis – ĉar en lia mondo oni plej alte taksas, krom honesta vivo, nur ankaŭ honestan morton – estis konservi la plendignon kiun oni postulas de iu Esterhazi en ĉi tia momento.

La nokton li pasigis maldorma sed kun fermitaj okuloj kaj sen ununura laŭta suspiro, por ke la gardisto, alĝustigante la okulon sur la spiontrueto, povu atesti ke la kondamnito dormis profundege, kvazaŭ estus okazante lia edziĝo, ne morto. Kaj li, en iu stranga temposinsekvo, jam aŭdis ke tiu gardisto rakontas en la oficirkazino: "Sinjoroj, la juna Esterhazi tiunokte profundege dormis, sen suspiroj, kiel antaŭ edziĝo, ne ekzekuto. Mi garantias per mia oficira honorvorto! Sinjoroj, ni omaĝu lin!" Tiam oni aŭdas (li aŭdas) la kristalsonon de glasoj. "Eks! – Eks!" ¹⁾

Tiu deliro de morto, tiu triumfa mastrado, tenadis lin la tutan matenon kaj sian trankvilecon li subtenadis per preĝo, rezistante per kunpremitaj dentoj al la malkuraĝa sinteno de la intestoj kaj de la simpatinervo, al tiuj perfiduloj de la volo kaj plaĉo; li hardis sian bravecon per familia legendo. Pro tio, por plenumo de la lasta deziro, kiun oni proponis al li laŭ la indulgema protokolo, li ne petis glason da akvo, kvankam lia internaĵo brulis, sed cigaredon, kiel iam antaŭlonge, unu el liaj praavoj petis iomete da tabako kiun li elmaĉitan sputis en la vizaĝon de la ekzekutisto.

La oficiro ekfrapis per kalkumoj kaj tendis al li sian arĝentan tabakujon. (Sinjoroj, per mia honorvorto. lia mano ne ekstremis pli ol la mia, jen, nun tenante ĉi tiun glason! Eks! – Eks!") Lume de la unua matena suno falanta transverse en la karceron kiel en la kripton de iu sanktulo sur antikvaj bildoj, leviĝis cigaredfumo violkolora kiel tagiĝo. La kondamnito eksentis ke la fumo, tiu brila iluzio, ĝenis pormomente lian forton, difektis ĝin, kvazaŭ li estus ekaŭdinta ie en malproksimeco la sonon de tarogato²⁾ kiu disvastiĝas superebenaĵe, kaj li rapide plankenĵetis la cigaredon surtretante ĝin per sia senspronigita husarboto.

"Sinjoroj, mi pretas!"

Elektita pro sia soldata simpleco, kurta kiel komando, nuda kiel elingita sabro kaj samtiel frida, tiu frazo devis esti eplarolita kiel raporto, senpatosa; sama kiam oni diras post diboĉo: "Bonan noktan, sinjoroj!" Sed, ŝajnas al li nun, de tio rezultis eĉ nenio digna je historio. Lia voĉo estis pura kaj sonora, la silaboj akraj, la frazo simpla, sed iel moliĝinta kaj kvazaŭ fendiĝinta.

Ekde tiu tago kiam lin vizitis la patrino, li perceptis, malgraŭ iu freneza espero, freneza kaj trompkaŝita, ke ekde nun lia vivo estas nur tragika farso kiun skribadas homoj preskaŭ tiom potencaj kiel dioj

Ŝi staris ĉi tie antaŭ li, korpulenta, forta, kun vualo survizaĝe, pleniginte la ĉelon per sia persono, sia eminenteco, sia karaktero, sia grandega ĉapelo kun plumoj kaj siaj roboj kiuj susuradis kvankam ŝi ekmoviĝis eĉ ne unu momenton. Ŝi rifuzis la ordinaran arestan tripiedon kiun proponis al ŝi la ulanoj, espriminte al ŝi per tio honoron kiun ili probable al neniu ankoraŭ esprimis ĉi tie, sed ŝi ŝajnis ne vidi ke oni metis apud ŝi ordinaran lignan seĝon, terure ordinaran ĉe ŝiaj silkaj falbaloj. Ŝi tiel restis staranta dum la tuta vizito. Ŝi parolis kun li france, por embarasi la ulanoficiron kiu flankestaris je deca distanco, kun elingita sabro surŝultre, kio pli similis saluton de honora gardo al la nobelino (kies nobeleco estis samtiom malnova kiel tiu de la imperiestro) ol singardemon kaj admonon al la fiera vizitantino de imperiaj kazematoj.

"Mi ĵetos min antaŭ liajn piedojn", flustris ŝi.

"Mi pretas morti, patrino!", diris li.

Ŝi severe interrompis lin, eble tro severe:

"Mon fils, reprenez courage!"³⁾

Nun ŝi la unuan fojon iomete ekmovigis la kapon en la direkto al la gardisto. Ŝia voĉo estis nur flustro, intermiksita kun la flustro de ŝiaj silkaj falbaloj.

"Mi staros sur la balkono", diris ŝi apenaŭ aŭdeble. "Se mi estos blankestita, tio signifos ke mi sukcesis..."

"Kontraŭe, vi estos funebre vestita, supozeble", diris li.

Ektiris lin el letargio la ree ekbruegintaj tamburoj, nun ŝajnis al li el pli gradna proksimeco, kaj li perceptis, laŭ la ekvivinta bildo kiu eĉ ĝis nun fikse staris antaŭ li ŝtoniĝinta en iu muta daŭrado, ke la legado de la verdikto estas finita; la oficiro faldis la paperrulaĵon, la pastro kliniĝis super li kaj benis lin per kruccigno; la gardistoj prenis lin subbrake. Ne permesinte ke oni lin levu, male, leĝera li ekstaris surpieden, nur iomete subtenata de du ulanoj. Subite, antaŭ ol li transpaŝis la ĉelosojon, ekstis en li, ie en la brusto, poste lin tutan inundis certeco ke ĉio finiĝos samtiel kiel postulas la logiko de la vivo. Nun ĉio estas kontraŭ la morto, ĉio estas sur flanko de la vivo en ĉi tiu premsonĝo: lia juneco, lia deveno, la gloro de lia familio, la amo de lia patrino, la imperiestra indulgo, eĉ tiu ĉi suno surfalanta lin dum li supreniras la kaleŝon kun dorseligitaj manoj, kiel ia rabisto.

Sed tio daŭris nur mallonge, nur ĝis kiam la kaleŝo atingis la bulvardon kie lin atendis bruega popolaĉo alvenigita el la tuta imperio. Dum la rarigitaj tambursalvoj aŭdis li la zumon de la homamaso, ĝian minacantan muĝon, kaj vidis la malame eksvingitajn pugnojn. La amaso aklamadis la imperiestran justecon, ĉar la popolaĉo ĉiam ovacias la

venkinton. Ĉi tiu sciigo rompis lin. Lia kapo nur iomete kadukiĝis surbrusten, la ŝultroj kuntiriĝis kvazaŭ li protektus sin kontraŭ frapoj (alflugadis eĉ kelkaj ŝtonoj), je talio li fleksiĝis nur iomete pli. Sed tio sufiĉis por ke la amasaĉo eksentu ke la kuraĝo perfidis lin, ke lia fiero rompiĝis. Tio provokis preskaŭ ĝojan kriadon. (ĉar la homamaso ŝatas vidi kiel frakasitas fieraj kaj kuraĝaj.)

Ĉe la bulvardfino, tie kie komenciĝas la nobelaj kurioj kaj kie la ameso iomete maldensiĝis, li levis la okulojn. En la lumo de la matensuno li ekvidis brilegan blankmakulon surbalkone. Kliniĝinta transbarile, tutblanke vestita, staradis tie la patrino, kaj post ŝi – por eĉ plie emfazi la liliabrilon de ŝiaj roboj – grandegaj malhelverdaj folioj de filadendrono. (Bone li konis ĉi tiun robon, ĉar tio estis familia relikvo: unu: el liaj praavinoj estis per ĝi vestita okaze de iu imperiestra geedziĝo.)

Subite li rektiĝis, preskaŭ spite, deziranta alkrii al ĉi tiu popolaĉo ke Esterhazy ne povas morti iel ajn, ne povas esti ekzekutita kiel ia ŝosea rabisto.

Tiamaniere li stariĝis ankaŭ sub la pendigilon. Kiam la ekzekutisto forŝovis la benketon de sub liaj piedoj, li ankoraŭ atendis miraklon. Tiam lia korpo ektorniĝis sur la ŝnuro, kaj liaj okuloj eliĝis el la kavoj kvazaŭ li subite estus ekvidinta ion teruran kaj timigantan.

"Sinjoroj, mi estis staranta je du paŝoj de li", rakontis en la oficira manĝejo la saman vesperon tiu ulano kun hirtigitaj lipharoj. "Kiam oni metis la ŝnuron ĉirkaŭ lia kolo, li trankvile rigardis la manojn de la ekzekutisto kvazau oni estus liganta al li brokattukon... Mi garantias, sinjoroj, per mia honora oficira vorto!"

Du konkludoj eblas. Aŭ la juna nobelo mortis kuraĝe kaj dignoplene, kun tutkonscio pri la certeco de la morto, alte tenante la kapon, aŭ vere tio estis nur bone elpenista reĝisorajo kies fadenojn mantenadis iu fiera patrino. La unuan, heroan interpreton subtenadis kaj disvastigadis, buŝe, kaj poste enskribis ankaŭ en kronikoj, la sankilotuloj kaj jakobanoj. La alian, laŭ kiu la junulo ĝis la lasta momento esperis iun magikan ŝanĝon, notis la oficialaj historiistoj de la potenca habsburga dinastio, por malebligi la naskiĝon de legendo. Historion verkas la venkintoj. Mitojn plektadas la popolo. Verkistoj fantaziadas. Certas nur la morto.

- 1) Ni fortrinku ĉion ĝis la fundo!
- 2) Hungara klarineto (rimarko de la tradukinto)
- 3) "Mia filo, reprenu kuraĝon!" (rimarko de la tradukinto)

Tradukis: Agnesa Eremija

Jubileoj

Nikola Tesla

Nikola Tesla naskiĝis la 10-an de julio 1856 en vilaĝeto Smiljan en regiono Lika (nuna Kroatio) kaj forpasis la 7-an de januaro 1943. en Novjorko en Usono. Li estas unu el la plej famaj sciencistoj, kiu sian vivon dediĉis al elektrotekniko kaj fiziko, unu el la plej fruktodonaj geniuloj kaj inventistoj en elektrotekniko. La unuan klason de elementa lernejo li finis en sia naskiĝloko kaj la aliajn en proksima Gospić.



Nikola Tesla

1856-1943

Malsano interrompis la studojn kaj post unujara paŭzo, li daŭrigas sian klerigon en gimnazio en Karlovac. Post abiturientiĝo, li grave malsanis je ĥolero kaj la resaniĝado daŭris preskaŭ unu jaron. Li decidas ekstudi teknikajn sciencojn en Fakultato en Graz kaj Prag. Li studas serioze kaj sindone lernante eĉ po dudek horojn tage. En Budapesxo li laboris kiel inĝeniero ĉe Telefona asocio kaj ĉe Kompanio de Edison en Parizo kaj Novjorko.

Printempe, en la jaro 1884., estinte 28-jara, li elmigras al Usono. kaj akceptas usonan sxtatanecon sed li restas en daŭra kontakto kun sia popolo. En Novjorko li fondas propran esplorlaboratorion en kiu li laboris ĝis la fino de sia vivo. Inter multnombraj inventaĵoj kaj problemoj kiujn li esploris, estas tre malfacile elekti kaj eĉ nur nombri la plej gravajn. Lia plej granda kontribuo al la elektrotekniko estis la utiligo de alterna kurento. Li patentigis kaj inventis pli ol mil inventaĵojn el diversaj elektroteknikaj branĉoj li inventis trifazan sistemon por transporto de elektroenergio kaj per tio faris revolucion en ekonomio de produktado kaj transporto de elektro, poste induktan

motoron, turniĝantan magnetan kampon, generilon kaj transformilon por altfrekvencaj elektroĵoj (t.n. Elektroĵoj de Tesla) kaj vicon da inventoj en radiotekniko pro kio oni povas nomi lin unu el pioniroj de radiotekniko. Li estas kreinto de sistemo por sendrata direktado kaj sendo de signo je distanco, inventinto de lumigo per elektroarko.

Estis publikigitaj liaj verkoj el fiziko kie li prezentis originalajn ideojn, kiuj poste efektiviĝis. Li skribis artikolojn pri diversaj temoj de la homa agado. Li estis granda pledanto por progresigo de la homaro emfazanta ĉiam gravecon de mondopaco. Lia nomo estas eternigita per internacie akceptita decido ke la unuo por magnetaj fluksoj ricevu lian nomon Tesla (T). La unuo egalas al unu Weber je kvadrata metro. Li efektiviĝis plurfazan alternan kurenton, solvis la problemon de transporto de elektro, eltrovis principon de turniĝanta magnetkampo kaj estis unu el la unuaj, kiu faris eksperimentojn kun elektromagnetaj ondoj, inter kiuj kelkdek estas vaste uzataj. De 1892 ĝis 1894. li estis vicprezidanto de la Usona Instituto de elektraĵoj inĝenieroj. Li estis geniulo, sed ankaŭ lia vivo estis neordinara. Dum la tuta vivo li estis modesta kaj sekreta.

Li estis tre alta, svelta, nigrahara kaj bluokula kun karakteriza rektstatura sinteno kiun li havis ankaŭ en la malfrua aĝo. Li mortis en soleco en sia apartamento en la tridek tria etaĝo de hotelo New Yorker.

En Beograd, strato Krunska 51 situas Muzeo de Nikola Tesla, en kiu estas videblaj interesaj dokumentoj kaj eksponaĵoj pri lia vivo kaj laboro.

Nedeljka Ložajić



KOMEDIOGRAFO JOVAN STERIJA POPOVIĆ (1806-1856)

Okaze de la 200-jaroj de la naskiĝo kaj 150-jaroj de lia morto –

Kun la renovigo de la romantika modelo de kulturo, je la dua duono de la 19 jarcento, pri Jovan Sterija Popović oni parolis kaj skribis simple pri Sterija. La nomigo Sterija incas la grekan naskiĝdevenon de la verkisto kaj ekestis en la popolo kiel kromnomo, simile al nomoj de aliaj serbaj verkistoj: Branko, Zmaj, Lazo. Elementan lernejon Sterija finlernis en la naskiĝurbo Vršac, gimnazion en Timișoara kaj Budapeŝto, kaj du jarojn de la juro li finstudis en Kežmark. En Vršac li estis kelkan



tempon profesoro de la latina lingvo. Advokato li fariĝis dum la jaro 1835. Kiam oni fondis Liceon en la urbo Kragujevac, Sterija estis invitita prelegi la naturjuron (1840-1842). Oni lin elektis ministro de la instruado (1842-1848); laborante en tiu ĉi kampo kun granda sukceso, li multe kontribuis al la fondo de la Societo de serba scienco, de la Popola teatro kaj Popola muzeo, verkis ankaŭ diversajn lernolibrojn kaj akiris gloron de la plejgranda serba komediografo. Li mortis la 26-an de februaro

1856.

Jam kiel lernanto de la mezlernejo en Vršac estonta komediografo Sterija komencis skribi “poetajn provojn”. Pro sia greka naskiĝdeveno, Sterija ekinteresiĝis pri la greka ribelo (1821), same kiel tiamaj grandaj eŭropaj poetoj Byron kaj Victor Hugo. Dum la jaro 1825 li anoncis publikigon de sia elekto de tradukitaj versoj *Seprunketa floreto al batalantoj grekaj*. La libro restis nepublikigita inter manuskriptoj de Matica srpska en Novi Sad. En tiu poemaro Sterija serben tradukis ok grekajn patriotajn poemojn, inter kiuj ankaŭ tri de revoluciulo Rigas Feraios, kaj du de klerigisto Adamantios Korais.

En la komenco de sia literatura verko Jovan St. Popović estis sub la influo de la klasika roma poezio, precipe de Horaco kaj Ovido, kaj tiuj

unuaj liaj versoj apartenas al pseŭdoklasika poezio kies serba elstarulo Lukijan Mušicki. Romanojn li komencis skribi entuziasmigita de tiama serba romanisto Milovan Vidaković, kaj aliaj modeloj. Jam en la jaro 1828, en hungara urbo Buda (nun parto de Budapeŝto) aperis lia romano *Batalo en la kampo de Kosovo aŭ Milan Toplica kaj Zoraida*. Tio estas serbigita romano de la franca verkisto Florian, el la 18-a jarcento – *Gonzalve de Cordone ou Genade reconquise*. En sia serba traduko Sterija uzis ankoraŭ historion de Jovan Rajić, kaj enmetis la rakonton pri Kosovo el la analo de la 18-a jarcento, kaj ĉion faris en la senco de la popola tradicio.

La ŝanĝo de liaj ideoj en la literatura verkado ekestis proksimume je la jaro 1830. Legante bonajn fremdajn verkistojn li spirite evoluis kaj akiris pli grandan literaturan kulturon. Lia modelo en la skribado de romanoj ne plu estas Milovan Vidaković sed Lesage, Stern kaj Viland. La unua parto de lia “ŝercema romano” – *Romano sen romano*, verkita en 1832, estis publikigita en Novi Sad (1838). Dum la skribado de tiu antiromantika kaj satira romano li sufiĉe uzis satirajn ideojn de la germana satiristo Wilhelm Rabener (1714-1771). Tiu verko de Sterija estas la unua satira romano en serba literaturo.

Jovan St. Popović la unua donis unu serban teatraĵon kaj faris la fundamenton de serba dramo kaj komedio. Por li „la teatro estas loko kie homoj lernas“, same kiel la serba klerigisto Dositej Obradović, serĉis „en la ludo kaj ŝerco belegajn kaj altnivelajn sciencojn“. El tiom granda interesiĝo de Sterija por la historio kaj popola literaturo naskiĝis lia laboro pri historiaj dramoj kaj la dramigo de unuopaj serbaj naciaj kantoj, kiel „heroa teatraĵo“ *Miloš Obilić* (1828) kaj *Nahod Simeon aŭ malfeliĉa gedziĝo* (1830). Ĉiuj tiuj verkoj – laŭ opinio de Jovan Skerlić – estas junaj provoj, tre romantikaj kaj sentimentalaj, ... kun kavalira ŝvelparolo, kaj sen kono de la teatra metio. En ili pli malfrue Sterija mem trovadis ĉiujn „spurojn de nematureco ne nur en la plano sed ankaŭ en la dialogo“.

Post sia literatura eduko, li daŭrigis skribi historiajn dramojn kaj tragediojn, sed kun pli bona lerteco. En tiu epoko, dum la kvardekaj jaroj de la 19-a jarcento, estas jenaj liaj dramoj: *Hajdukoj* (1842), verkita laŭ la nacia kanto; *Vladislav* (1842) el la serba kaj bulgara historioj, el malnova historia legendo pri Vladimir kaj Kosara; *Lahan* (1842), malgaja teatraĵo kun la temo el la bulgara historio, kaj *Skenderbego*. Tiuj teatraj tekstoj

kun sia historia enhavo kaj patriota tendenco kontentigadis la bezonojn de tiama serba scenejo kaj havis grandan sukceson ĉe tiamaj serbaj spektantoj, por kiuj plej forta estis la patriota sentado.

La romantikisto en la dramo kaj tragedio, Sterija estas realisto en la komedio. Li fariĝis la unua verkisto de komedio en la serba literaturo. Li ekiras de tute nova ideo por ke oni devas prezentadi realecon kaj pentri tipojn el la moderna vivo, sed ĉiam oni devas plibonigi la malbonon en la popolo kaj societo. La unua lia eksperimento ligita al tio estis *La mensogo kaj paramensogo* (1830), la komedieto de karaktero, en kiu oni mokas mensogan kaj supraĵan fremdan edukon, kun multaj lokaj vere serbaj elementoj, kaj tipoj el la ĉiutaga vivo.

La komedio *Avarulo*, pli konata laŭ la nomo de la ĉefa persono *Kir Janjo* (1838), estas la komedio de karaktero en kiu, kiel en la komedio pri avarulo de Moliere, estas pentrita la pasio de avareco personigita en homo mem. Kiel komedioj *Mensogo kaj paramensogo* kaj *Avarulo* tiel ankaŭ *Malvirta virino* (1838) estas karaktera komedio kaj ĝi estas burleskaĵo pli ol komedio. Ĝi estas verkita laŭ iu germana opereto. Sama estas la komedio „Pretendema virinaĉo“ („Pokondirena tikva“)

Fulma observanto, sobra animo, kun malofta kapableco vidi malbonajn flankoj de homoj. Tiuflanke liaj plej bonaj verkoj estas „teatraj fragmentoj“ *Edziĝo kaj edziniĝo* (1841), sceno ellaborita el lia propra verko *Romano sen romano*, bildo de konvenciaj kaj burĝaj geedziĝoj pro profito; *Beogrado iam kaj nun* (1853), vizio de la patriarkeca generacio kaj de nova generacio kiu akceptas okcidentan kulturon. Aparte estas grava lia verko *Patriotoj (Rodoljupci)*, produkto de lia sprita kaj literatura matureco, amara satiro de la pseŭdopatriotismo.

Sterija ne estas ĉiam originala, sed li havas grandan literaturan edukon kaj konon de grandaj modeloj el fremdaj literaturoj, precipe de Moliere. En liaj verkoj oni uzas naturan lingvon, ĉiu persono havas sian propran esprimon montrante veran kaj interesan bildon de la serba societo el la periodo de 1825 ĝis 1850.


Jovan St. Popović estas unu el la plej mensaj serbaj poetoj de tiu epoko. Jam kiel lernanto li skribis poetajn provojn kaj pro tio oni tiam lin nomis *poetarum patriarcha*. Liaj unuaj versoj estis klasikismaj, laŭ la modelo de Lukijan Mušicki. Kiam dum la jaro 1844 li ordigis la mezlernejan edukadon en Serbio, li donis al ĝi klasikan kaj humanisman

karakteron. Tradukante Horacon, li uzis la klasikan metrikon kaj intencis transpreni la grekan prozodion en la serban poezion. Li postlasis la manuskripton *Pri la prozodio*, kiun oni gardas en la biblioteko de Matica srpska en Novi Sad.

Kiel poeto, en tuta poeta valoro, li montriĝis en la lastaj jaroj de sia vivo. Nome, en la jaro 1854 en Novi Sad aperis lia tre konata kolekto *Davorje*. Liaj reflektivaj versoj apartenas al la plej intelektaj produktoj de la serba poezio. Sterija verkis versojn pri siaj sentoj, pri la profunda homa malfeliĉo, pri la eterneco de homa doloro kaj pri pasemo de homa vivo. Li estas la plej bona serba poeto de la objektiva liriko kaj intelekta poezio.

Sterija dumvive ĝuis grandan literaturan rekonon kiel poeto kaj komediografo. En sesdekaj jaroj de la 19-a jarcento li perdis sufiĉe da sia gloro, pro tio ĉar li ne skribis en pura popola lingvo kaj tiamaniere li ne subtenis la serban reformiston Vuk Karadžić. Intertempe ŝanĝiĝis la literatura gusto, kaj novaj historiistoj de nia literaturo substrekis la signifon de liaj dramaj verkoj kaj plifirmigis lian gloron “de la patro de serba dramo” kaj de la komedio.

M. Stojanović



Stevan Stojanović Mokranjac (1856-1914)

Stevan Stojanović Mokranjac naskiĝis en Negotin en la jaro 1856 kaj la kromnomo Mokranjac li ricevis laŭ la naskiĝloko de liaj gepatroj (Mokranje). Lia kromnomo signifas “Mokranjano”. Tiu kromnomo estas tiom ofte uzata, ke oni preskaŭ forgesis lian veran familian nomon kaj preskaŭ neniu konas lin kiel Stevan Stojanović, sed nur kiel Stevan Mokranjac.



Li studis muzikon en Munkeno, Romo kaj Leipzig (Germanio) kaj, reveninte al Sebio, li estis dirigento de Beograda kant-societo, instruisto de muziko en la Unua beograda gimnazio kaj prelegis ĉe la Teologia fakultato. Krome, li kolektis popolajn kantojn (pli ol 300 el diversaj partoj de la lando) kaj skribis la unuajn studojn pri ili iniciante tiel la muzikologion en Serbio.

La plej konata verko de Mokranjac estas “Rukoveti” (malnovserba vorto por bukedo, manpleno, ne necese de floroj). La nomon Mokranjac elektis por asocii la muzikon kun sovaĝaj floroj kaj iliaj koloroj kaj aromoj. Kvankam multaj diras ke lia subteno de serba muziko estas pli grava ol liaj komponaĵoj, oni tre ofte aŭskultas lian muzikon. Multaj popolaj kantoj estus jam forgesitaj se li ne estus konservinta ilin en sia verko.

Lia verko estis prezentita en tuta Serbio kaj ankaŭ en multaj urboj ekster Serbio. Mokranjac, kun sia Kantista societo, gastis en Saloniko, Budapeŝto, Sofio, Plovdiv, Turkio, Sank Peterburg, Niĵni Novgorod, Moskvo, Kiev, Rijeka, Triesto kaj Zagrebo.

Kun Stanislav Binički kaj Cvetko Manojlović li en 1899 fondis la unuan memstaran lernejon en Serbio – la Serban muzikan lernejon. Li restis direktoro de la lernejo ĝis sia morto. Li mortis en Skopje la 28-an de septembro en la jaro 1914.

En lia naskiĝloko Negotin oni ĉiujare, honore al Mokranjac, organizas muzikan festivalon sub la nomo „Mokranjĉevi dani“ (Tagoj de Mokranjac). En la urbo ekzistas ankaŭ la muzeo pri Mokranjac en lia domo.

Adem Jakupović

Eseoj

Zlatoje MARTINOV

ĈU LA ESPERANTO-TRADUKADO ESTAS ARTO?

Ĉu la E-tradukado estas arto? Tio estas la ĉefa demando kiun hodiaŭ starigas niaj esploristoj kaj tradukologoj. Fakte la demando povas koncerni, sendube, ankaŭ la tradukadon ĝenerale, senescepte pri kiu(j) lingvo(j) temas, ĉar ankaŭ Esperanto estas lingvistike kaj tradukologie rajtoplana lingvo.

Se la respondo estas jesa, do, kiaspeca, arto ĝi estas kaj kiomgrada, kiomkvalita? Por tion ekspliki, ni bezonas kelkajn klarigojn kaj rimarkojn.

1. La tradukprocezo ne egalas al tiel nomata memstara kreado. Memstara kreinto, ĉu poeto, ĉu prozisto, mem anoncas siajn anim-produktojn, informas senpere pri ili. Tutsame, nur en alia formo, tion faras ankaŭ la pentristo, skulptisto, komponisto. Tradukinto ne faras tiel! Li dependas de la poeto, verkisto, eseisto k.s. La tradukinto estas ilia advokato, ilia peranto, ilia rajtigito. De lia kapablo plejparte dependas ilia sukceso, sukceso de ilia verkoj, ĉar oni prave diras: malbona traduko sufiĉe ofte sukcesas "mortigi" kvalitan verkiston.

2. La nombro de talentaj verkistoj estas pli granda ol tiu de tradukintoj. Se la laboro de la tradukintoj estus facila, la tradukintoj certe abundus! Do, se temas pri speciala talento esti sukcesoplena tradukinto - kaj ĝi estas nepre bezonata - tiam klaras ke ĉi talento estas tiu de *aparta speco*, ke ĝi konsistas el multnombraj elementoj, eĉ pli multnombraj ol tiuj de t.n. memstaraj kreintoj, kaj ĝi estas, do, pli malofta, se ne eĉ tro malofta. Tiu ĉi aserto estas tiom veroplena ke oni eĉ ne devas ĝin pruvi. La pruvo troviĝas en fakto ke multaj verkistoj estas ankaŭ tradukistoj aŭ tradukintoj kiel ajn oni volas. La konkludo evidente favoras la tradukinton kiel eksterordinaran specon de kreinto.

3. Ĉar ni jam elbuŝis la vorton "kreinto", ni provu enkadrigi tiun eksterordinaran specon en sian artan lokon.

Se la tradukprocezo ne povas ekzisti sen vortoj, sen tekstoj, tiam ni konfesas ke ĝi tutsimilas al aliaj artoj kiuj ankaŭ ne ekzistas per si mem, do ne ekzistas memstarece. Ili estas: aktorado, reĝisorado, kantado, direktado korusa k.s. Ili ĉiuj estas reproduktivaj. Se la aktoro, reĝisoro, kantisto, korusa direktanto helpe de siaj talentoj sed kun ĉefa kondiĉo - teksto aŭ partituro - estas artisto, tiam sendube tio estas ankaŭ la tradukinto, ĉar lia ĉefa tasko estas sur alia agokampo realigi la saman

ideon - artan plezuron samnivelan al tiu kiu troviĝas en, ekzemple, muzikaj notoj.

4. Sed kion pri la arta ilaro?

La tradukinto uzas nur la vortojn, la aktoro krom la vortojn uzas ankaŭ siajn voĉon, movojn kaj mimikon. La samon faras ankaŭ la kantisto kaj la direktanto korusa. Aliflanke, la verkisto kaj la tradkinto uzas nur la vortojn kaj de tie devenas ilia limigo: sen vortoj la verkisto kaj la tradukinto signifus nenion, ili sen la vortoj ne ekzistus. Ili ne povus trairi siajn, sen vortoj limigitaj, barilojn. La aktoro havas ion pli favoran situacion: voĉo kaj movoj, mimikoj kaj gestoj, multe helpas al li por malstreĉi tiun limigon. La kantisto, siaflanke, havas pli favoran pozicion ol la aktoro. En lia kazo, la vortoj estas malpli gravaj ol melodio, ĉar la melodio ne konas ajnajn limojn. Same okazas kun, ekzemple, la direktanto korusa. Evidente, do, la pozicioj de la verkisto kaj la tradukinto, el la vidpunkto de disvastigo de iliaj artoj estas malplej favoraj.

Tamen ni konkludu ke malgraŭ certaj diferencoj, specifaĵoj kaj simile, ĉiuj reproduktivaj artoj havas unu komunan trajton: ili ne ekzistas sen skribaj tekstoj, muzikaj notoj, partituroj. Tio estas la ĉefa kondiĉo por ilia ekzisto.

La tradukinto, kvankam diferencas de aliaj artistoj en tiel nomataj "reproduktivaj artoj", tamen estas, kadre de sia agokampo en firma ligo kun ili. En tiu ligoĉeno li, sendube, estas pli proksima al la verkisto ol iu el liaj reproduktivaj kolegoj (la aktoro, kantisto, direktanto korusa), kvankam la naturo de ilia laboro estas principe la sama. Samkiel ĉiam ekzistas diferenco inter la originala verkista teksto kaj ĝia reprodukto far la "reproduktiva artisto", samtiel ekzistas diferenco inter la tondonado kiun sugestas originala teksto de poeto aŭ prozisto, kaj tiu far la tradukinto. Tial oni trovas eĉ en plej bonaj tradukaj atingiĵoj. Kial?

La kialoj estas simplaj.

Unu el ili estas *lingvo*. Pli precize dirite: melodia varieco de la lingvoj: lingvo el kiu oni tradukas kaj lingvo al kiu oni tradukas. Ĉu oni vere kredas ke la tradukinto. eĉ la plej elstara, plej kvalita, povas la originalan beletran tekston tute aŭtentike transponi en iun novan akordon faritan el tute aliaj elementoj ol la originala? Tiun postulon povas starigi nur persono kiu ne havas la artosenton. Sed ĉiu alia kiu ĝin almenaŭ iomete havas, bone scias ke ne povas ekzisti du tutsamaj lingvomuzikoj, samkiel ne povas ekzisti du samaj perantoj, aŭ finfine, du samaj personoj.

La dua kialo estas *la reproduktinto*. Por transponi la verkon de ekzemple Ŝekspiro en Esperanton (aŭ en iun alian lingvon tutegale), la tradukinto devus esti malgranda Ŝekspiro. Sed ĉu oni povas ĉiam, ĉiumomente kaj ĉie, trovi Ŝekspiron? (La zamenhofaj mistraduk-elementoj de "Hamleto" klare montras la verecon de ĉi tiu aserto!). Se la naturo tiel ordigus la aferon, oni ĉiam povus trovi duulojn de grandaj

homoj sur ĉiuj geografiaj regionoj kaj epokoj. Sed ni scias ke tio ne estas ebla. Tial multaj talentaj tradukintoj luktos kun diversaj literaturaj tekstoj provante helpe de siaj talento, kapablo kaj intelekto, prezenti al la mondo la ĉarmon kaj belecon de la originalaĵo. Ni daŭrigos laŭdi kaj mallaŭdi la tradukintojn kaj iliajn tradukaĵojn, ĉiam serĉante la plej kvalitan kaj la plej “proksiman” tradukon.

Sed kiamaniere atingi tiun “proksimecon”, tiun aŭtentikecon de la traduka teksto?

La unua kondiĉo estas ke la tradukinto devas havi literaturan talenton, poetikan senton, li devas esti iuspeca literaturisto, kvankam nebezonte ke li estu verkisto aŭ poeto. Li simple devas havi kreativajn kapablojn, grandajn ĉiosciojn, inventemon, erudicion kaj bonan konon de diversaj sciencoj kaj fakoj.. Lia personeco, do, devas esti kompleta, pli kompleta ol tiu de la verkisto.

La dua nepra kondiĉo estas bonega kono de Esperanto al kiu/el kiu li tradukas el/al la gepatra lingvo. Kiom ofte la esperantistoj tiun kondiĉon bagatelas! Nur en kontakto kun la beletra teksto la esperanto-tradukinto sentas la kompletan kaj veran gravecon de ĉi tiu kondiĉo! Tiam li ekkonas kiom malgranda estas lia kono de la internacia lingvo, “facila kaj simpla”! Kiom multe da pacienco li devas havi! Kiu ne havas bonegan lingvokonon kaj paciencon - ne komencu tradukadi!

La tria kondiĉo estas *la samnivela* kono de la gepatra lingvo. Multaj antaŭjuĝoj regas koncerne bonegan konon de la gepatra lingvo de la tradukinto. naskita en konkreta regiono, parolanta ĉiutage la gepatran lingvon, lernante kaj studante, eventuala tradukonto opinias sin bona konanto de la lingvo. Bedaŭrinde tio neniam estas vero. Ankaŭ la gepatran lingvon oni devas konstante lerni. Kiel ĉiu lingvo, ankaŭ la gepatra, ŝanĝiĝas, evoluas, perfektigas, riĉiĝas per novaj vortoj... La tradukonto devus sekvi la lingvoŝanĝojn, nuancajn evoluojn, unuvorte li devas, se li volas iĝi tradukanto, akompani sian propran lingvon kiel infano, paŝon post paŝo. La plejprincipo en la tradukarto estas ke nekonata legontaro ĉu la esperanta, ĉu la gepatra, sentu ke en la manoj ĝi tenas originalan libron, ne la tradukaĵon.

Se oni sukcesis kontentigi tiun plejkondiĉon, tiam oni povas diri ke tutcerte la tradukprocezo estas siaspeca artprocezo, la tradukanto estas vera artisto kaj la tradukaĵo estas arto ĝuste pro la fakto ke oni ĝin preskaŭ ne povas diferencigi de la originalo.

Recenzoj

Novaj libroj

Esperantistoj en Serbio



En tiu ĉi jaro Esperanto-societo “Radomir Klajić” eldonis la libron *Esperantistoj en Serbio* enhavanta 315 biografiojn, plejparte kun bildoj, de aktivaj samideanoj. La neceson kaj iniciativon por fari tiun libron donis d-ro Pribislav Marinković al kiu fervore helpis multaj esperantistoj el Beogrado kaj ekster ĝi. En la redakcio estis krom la ĉefredaktoro, P. Marinković, Dimitrije Janičić, komputile prilaborinta la manuskripton, Branko Despotović kaj Adem Jakupović, verkinta la antaŭparolon en la libro. La eldonkvanto estas 400 ekzempleroj.

Tiun ĉi libron oni eldonas post 21 jaroj de la aperigo de *Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj*, verkita en la jaro 1985 de Marinko Gjivoje. Diference de ĝi la nova libro ehavas informojn nur pri vivaj esperantistoj, kaj kompreneble nur el unu parto de la eksa Jugoslavio, el Serbio. Ĉe la fino da la libro estas aldonitaj *In memoriam* kun kvarpaĝa listo de ne ĉiuj mortintaj esperantistoj kaj *Biografioj* pri kvar elstaraj, eminentaj kaj, bedaŭrinde jam forpasintaj dojenoj de nia E-movado.

En ĉi tiu monografio estas publikigitaj biografioj nur de tiuj samideanoj kiuj sendis siajn informojn. Ili estas aŭ junaj aŭ majjunaj, tre aŭ malmulte edukitaj, bonegaj konantoj de la IL kaj komencantoj, E-verkistoj kaj elstaraj samideanoj en E-movado kune kun tiuj kiuj jam forgesis paroli kaj ne aktivas en E-societoj. Dank’ al fervoraj samideanoj el opaj provincaj urboj: Smederevo, Vranje, Leskovac, Zaječar ktp. la Redakta komitato ricevis plurajn informojn kvankam ne ĉiam kun kompletaj donitaĵoj.

Estus interesa analizo de la prezentitaj biografioj. Pro ne sufiĉe da spaco mi mencios nur kelkajn rimarkojn. Oni povas unue konstati ke,

kompreneble, ne estas analfabetoj inter esperantistoj. Due, ke instruiteco de la gesamideanoj multe superas mezan instruitecon kaj klerigan nivelon de la loĝantaro de Serbio. Ekzemple, la klerigaj laboristoj, instruistoj, profesoroj ktp. kaj inĝenieraj profesioj faras ĝuste unu duonon de ĉiuj enketitaj gesamideanoj, do de la landa espentaristaro. Poste, ke esperantistoj en Serbio pli bone konas kaj ŝatas lerni fremdajn lingvojn ol aliaj homoj, ne interesiĝantaj pri Esperanto. 26 personoj finlernis filologian aŭ filozofian fakultatojn, 77 parolas anglan, 60 parolas aŭ servas sin per rusa, 39 konas francan, 26 germanan, 16 hungaran lingvojn, ktp.

Pedagogian akademion finlernis 6, Ekonomian 19, Juran 11, Natur-sciencan 7 fakultatojn. Doktoroj pri medicino estas 12. Diversajn fakultatojn, akademiojn kaj superajn lernejojn finlernis 150 personoj, preskaŭ unu duono de la enketitoj. La 15 ricevis sciencajn titolojn: 10 estas magistroj kaj 5 doktoroj de scienco, samtiel ili instruadas ĉe universitato.


En la libro tamen troviĝas kelkaj mankoj: sinsekvo de familiaj nomoj ne estas ĉiam bone ordigita, kelkaj fotografiaĵoj mankas kaj eĉ du biografioj ne estas enigitaj, pro kio la Redakta komitato petas pardonon. La eldonantoj dankas al m-ro Gvozden Sredić, kiu finance helpis la publikigon de la libro.

En la Pedagogia Muzeo en Beograd, la 9-an de oktobro 2006, dank' al afableco de la Estraro de la Muzeo kaj aparte al la komprenema m-rino Maja Nikolova, muzeogardistino, oni malfermis solenan promocion de la libro kun ĉeesto de ĉirkaŭ 60 personoj. Al la publiko parolis: Adem Jakupović, Dimitrije Janičić kaj d-ro Pribislav Marinković.

Pribislav Marinković

Josip Pleadin, **ORDENO DE VERDA PLUMO**, Leksikono pri esperantlingvaj verkistoj, eldonis Grafokom, ĉurĉevac, 2006.

SENDUBA VALORAĴO



“Bonvenon en parkon de originala Esperanto-literaturo. Ĝuu la verdaĵon. Fartu agrable en ombro de grandaj nomoj de Esperantujo! Tie jen superas ĉiujn la elituloj Baghy, Kalocsay, Auld, Waringhien, Hohlov, kaj aliaj kverkoj, kreskintaj dum multaj jardekoj, pri kies vivhistorioj ni jam delonge ĉion scias...sed tamen sen malgrandaj arbustoj kaj verda herbtapiŝo nia parko aspektus malriĉa, dezerta kaj povra loko” Per tiuj ĉi vortoj komenciĝas la antaŭparolo de kompilinto Josip Pleadin pri la signifoplena kaj ĝis nun unika verko en Esperantujo pri Esperantlingvaj verkistoj. La pli ol 500-persona fotoalbumo helpas al la legantaro konatiĝi kun tiuj kiuj dum 120-jara periodo esperantlingve kreis poemojn, prozaĵon, kaj tradukis en Esperanton kaj same el ĝi en siajn naciajn lingvojn. Laŭ vortoj de la kompilinto la intenco de la Leksikono estas prezenti la verkistojn ne per iliaj verkoj - tion faras antologioj - sed prezenti iliajn personecojn, iaspecajn mallongajn rakontojn pri iliaj vivoj. Eble ne ĉiu esperanta verkisto kaj tradukisto ricevis adekvatan lokon laŭ siaj literaturaj meritoj, eble ne ĉiu eniris la leksikonon, sed tamen la plejmulto da plejgravuloj certe en ĝi enestas. Pleadin havis dujaran ampleksan, tre malfacilan laboron kaj pro tio kelkaj evidentaj libromankoj estas ne nur tute kompreneblaj, sed ankaŭ pardoneblaj. Oni ne rajtas tro multe kritiki sed povas tamen bedaŭri cxar, ekzemple, ne ekzistas enhavo kaj nomindekso kiuj por la leganto estus pli utilaj ol la ekzistantaj literaturo kaj mallongigoj. Sed ni ripetu: la leksikono estas nia vera bezono kaj senduba valorajo, ĉiampreta kaj neevitebla helpilo al ĉiuj kiuj okupiĝas diverssence kaj diversteme (analizas, recenzas, science esploras) la historion kaj la estetikajn valoron pri la Esperanto-literaturo. Ĉar libro tiel bele aspekta kaj tiel ampleksa, kiu prezentas preskaŭ ĉiujn niajn literaturistojn de Zamenhof ĝis la hodiaŭaj tagoj, ne ekzistis en la Esperanto-medio, do, ni varme ĝin salutu kaj ekdeziru al ĝi sinceran bonvenon.

Zlatoje Martinov

79-a SAT-kongreso 2006

La 79-a SAT kongreso okazis en Beogrado inter la 19-a kaj la 26-a de aŭgusto 2006. La ĉeforganizanto estis la Fervoja Esperanto-Asocio "Branko Maksimoviĉ" kiu kun OKK zorgis ke la kongreso okazu en konvena loko, kun altnivela kultura programo kaj ekskursoj kiuj konatigis nian landon al la kongresanoj. Aliĝis entute 160 sed venis nur 134 SAT-anoj, kaj dekoj da unutagaj gastoj. Multaj ne povis veni pro manko de la pasportoj kiujn oni devas nun ŝanĝi en Francio laŭ eŭropaj reguloj.

Samtempe oni festis la 50-jaran jubileon de la ekzisto kaj agado de la FEA "B. Maksimoviĉ" kaj la 50-jaran jubileon de okazo de la lasta SAT-kongreso en Beogrado. Samtempe oni ankaŭ donis memordank-diplomojn al unuopuloj kiuj jam pli ol 50 jaroj estas esperantistoj.

Dum solena malfermo estis prezentita la poemlibro de s-ino Greta Stoll "MIOZOTO" kiun eldonis FEA "B. Maksimovic" kaj kiun ricevis ĉiu kongresano.

Pro ĉio priskribita la malfermo de la kongreso okazis en solena salono de Serbaj Fervojoj. Poste, la loĝigo kaj la konstantaj programoj okazis en Studenta urbo en Nova Beogrado.

La Plena laborkunsido debatis pri aktualaj socipolitikaj temoj:

- la lastatempa protestmovado kontraŭ unuadunga kontrakto en Francio kaj ĝiaj politikaj perspektivoj,
- naciismo kaj edukado en Japanio kaj aliaj landoj,
- ĉu la SAT-movado prezentu Esperanton samstile kiel la neŭtrala medio,
- la politika situacio en Mezoriento.

Fine estis akceptita la Deklaracio kaj gvidrezolucio, kiujn vi povos legi en Sennaciulo.

Okazis ankaŭ laborkunsidoj kaj kunvenis la frakcioj de la liberpensuloj, komunistoj, ĉielarka, sennaciisma kaj poresperanta fakoj. Estis montrita intereso por revigliĝo de porpaca frakcio.

La prelegoj :

- La stato de nia esperanto-histogramo kaj niaj devoj ĉi-rilate, prezentita de Zofia Banet-Fornalowa,
- La vivuldiverseco; kio ĝi estas, kial indas protekti ĝin kaj ĉu tio estas ebla en kapitalisma mondo, prezentita de Vinko Markov
- malarmado; informiĝi por agi, agi por malpermesi, prezentita de Colette kaj Andreo Weiss

- Esperanto, lingvo de paco en Afriko-Burundo, prezentita kun bildoj de Tereza Kapista.

Du vesperoj estis dediĉitaj al kultura programo. Unu vesperon estis libera programo kiun realigis la kongresanoj mem, kantante, kun muzikado kaj poemoj. Ni devis konstati ke ili vere prezentis kvalitan programon. Ni dankas al ili.

La duan vesperon ludis Junulara Filharmonia orkestro de la talentaj infanoj de Beogrado (50 anoj en orkestro). Ili elvokis grandegan kontenton de la kongresanoj. Ni kolektis al ili entute 130 eŭrojn kaj donis al ili unuopajn dank-leterojn pro la sukcesega koncertado. Samvespere ludis profesiaj aktoroj: Jerzy Fornal el Pollando, Vida Jerman el Kroatio kaj Saša Pilipoviĉ el Kragujevac-Serbio. La publiko entuziasme dankis ilian altkvalitan ludon per forta aplaŭdo.

La ekskursoj estis sukcesaj: ni faris urbovizitadon kun vesperanĝo, viglan ŝipekskurson, rigandante la urbon de la riveroj Danubo kaj Sava, kie la ĉeestantoj eĉ rondodancis popol-dancon kiu plaĉis al eksterlandanoj kaj kiuj kundancis. Ni vizitis la fortikaĵon de Smederevo, Monumenton de nekonata heroo sur monto Avala kaj faris tutagan ekskurson al Ŝargan, vojaĝante per mallarĝspura trajnolinio tra montoj en pitoreska naturo.

Mi devas mencii, ke ĉirkaŭ 40 kongresanoj estis akceptitaj en Urbodomo de Beogrado kie ili interparolis kun la vicurbestrino Radmila Hrustanoviĉ. Ni ankaŭ povis vidi la ekspozicion pri Nikola Tesla, grava serba sciencisto.

Ni ĉiutage ricevas dankmesaĝojn kaj la kongresanoj esprimas la kontenton kun la Kongreso, kvankam ni konscias ke estis kelkaj mispaŝoj, sed neniu pro tio protestis, ili vidis la eblecojn kaj nian klopodon plenumi serioze la taskon kiun ni prenis sur niaj ŝultroj.

Mi nepre devas esprimi grandegan dankon pro la helpo kaj financa subteno al la Serba Fervojo, sen ili ni ne povus ĉion realigi.

Tereza Kapista
Prezidanto de OKK

Omaĝe al Tibor Sekelj

Surprizite sed kun ĝojo mi ricevis la invitilon ke en Urba muzeo de Senta okazas ekspozicio sub titolo "Plenmano da Mondo". La ekspozicio estis malfermita la 11-an de marto 2006. Malfermis ĝin: Siniša Veličković, prezidanto de la Esperanto-Asocio, Magdolna Revid, la sekretariino de la sama Asocio kaj Atila Pejtin la organizanto de kulturaj

aranĝoj de Muzeo. La "Plenmano da Mondo" estas ero da mondo de Tibor Sekelj. Mi citas el katalogo: " La esperantistoj el Senta ĉiujare organizas memorfeston okaze de naskiĝtago de Tibor Sekelj. La pasintan jaron tiuokaze - pere de ili – la vidvino de mondvojaĝanto, Erzsebet Sekelj ofertis parton de lia kolekto al Urba muzeo en Senta, kiu estas la enhavo de ĉi tiu ekspozicio. Tiuj 86 pecoj de diversaj objektoj (plejparte muzikiloj, ĉapoj kaj maskoj) estis transdonitaj al la Muzeo dum aŭtuno de 2005"..."

Tiu trezoro, kiun li koletis certe kun granda pasio, povas esti por ni plenmano da mondo..."

Do, dank' al la bona rilato kun esperantistoj en Senta, post la morto, parto de havaĵo de Tibor por ĉiam restos en Senta. La Muzeo planas trovi lokon por instalati memor - ĉambron kaj tiamaniere la objektoj el fora Afriko, Azio, kaj Oceanio restos ekspoziciataj.

La agado de esperantistoj el Senta montras ke eblas la kultura kunlaboro ankaŭ kun aliaj kultur-organiozaĵoj.

Por tiuj, kiuj ne sufiĉe konas Tibor Sekelj, jen kelkaj faktoj: Li naskiĝis en 1912 en Spiška Sobota (nun Slovakio) kaj mortis en 1988 en Subotica. Intertempe dum pli ol 15 jaroj li vivis en Argentino, Venecuelo, Bolivio, Gvatemalo kaj Meksiko. Li finis juran fakultaton sed laboris ankaŭ kiel ĵurnalisto, studis muzeologion kaj fine eĉ magistriĝis kiel muzeologo kaj etnologo. Esperanton li eklernis jam en 1936 en Zagrebo. Li revenis el Sud-Ameriko en la jaro 1954 kaj unue vivis en Zagrebo, Beogrado kaj la lastajn jarojn en Subotica. Lia aktiveco en Esperantujo certigis al li honoran membrecon de UEA, samtempe li estis fondinto de la Esperanto-Verkista Asocio (EVA) kaj ano de Esperanto Akademio. Li travojaĝis multajn ekzotikajn kaj ofte nekonatajn landojn kaj de tiuj vojaĝoj alportis la objektojn kiuj karakterizis tiujn regionojn. Lia domo estis simila al muzeo. Aparte interesa estis la kolekto de la "kapokovriloj" kiel li nomis pli ol 300 diversajn ĉapelojn, ĉapojn, kapornamojn, sombrerojn, lentojn, flordekoraĵojn surkapajn kaj ĉion kion la homoj portas sur la kapo.

Li estis multflanka kaj parolis 25 lingvojn sed skribis, kaj povis verki en naŭ lingvoj. Li aperigis pli ol 30 librojn, plejparte vojaĝpriskribojn kiuj aperis en multaj lingvoj kaj eldonitis en diversaj partoj de la mondo.

Li estis vera mondvojaĝanto, kiel estis enĉizita en blankan marmor-ŝtonon sur lia tombo en Subotica.

Sentaj espertantistoj meritas laŭdon pro ilia aktiveco kaj Erzsebet Sekelj dankon pro la elkora kaj valora donaco.

Tereza Kapista

Informoj

Ankoraŭ unu E-kurso

Je la fino de marto ĉi-jare en beograda societo „Radomir Klajić“ komenciĝis nova elementa E-kurso. La kurson, kies gvidanto estas s-ro prof. Branko Despotović, partoprenis tri kursistinoj: oficistino, s-ino Mirjana Ocokoljić, kaj pensiulinoj, s-ino Mirjana Nešić kaj s-ino Gordana Berić. La kurso okazis du foje semajne: marde kaj ĵaŭde po du instruhoroj, t.e., oni havis semajne po kvar instruhorojn. La kurso daŭris tri monatojn. Poste la kursistinoj faris A ekzamenon.

La kurso uzis la lernolibron de nia elstara forpasinta esperantisto Miodrag Kocić. Estas interese, ke, jam post tri semajnoj, la kursistinoj povis korekte legi esperantajn tekstojn, traduki kaj formi simplajn esperantajn frazojn. Ili ankaŭ sukcese faris hejmajn taskojn en formo de tradukado de mallongaj frazoj (serben aŭ esperanten) kaj korektado de eraroj en tekstoj.

Oni nepre menciui, ke s-ino Gordana Berić veturadis al la kurso el Lazarevac ĝis Beograd, marde kaj ĵaŭde, po 90 minutojn en ambaŭ direktoj.

Estas menciinda la fakto, ke antaŭ du jaroj finis B kurson, gviditan de s-ro Branko Despotović, kvin aktivaj geesperantistoj, anoj de la societo „Radomir Klajić“, el kiuj la plejparto estas mezaĝuloj aŭ junuloj kaj ili tre sukcese faris B ekzamenon.

B. Despotović

Kvindekjara datreveno de Esperanto en Zaječar

La 3-an kaj 4-an de junio en Zaječar esperantistoj de tiu urbo organizis solenan feston okaze de kvindekjara jubileo de la fondiĝo de Esperanto-societo. Al la festo oni invitis esperantistojn el aliaj urboj. Entute la feston partoprenis ĉirkaŭ cent personoj. Oni vizitis diversajn vidindaĵojn en Zaječar kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Kelkaj esperantistoj estis invititaj al akcepto ĉe la urbestro de Zaječar. La urbestro esprimis komprenemon por problemoj de esperantistoj. La dutaga festo pasis en agrabla atmosfero kaj amikeca kunesto de esperantistoj. Pri la okazaĵo informis ankaŭ la loka gazeto „Timok“.

Adem Jakupović

Ekfunkciis la plej alta fervojo en la mondo

La 1-an de julio oni solene malfermis fervojlinion tra tibeta altebenaĵo. La konstruado daŭris kvin jarojn. La linio estas 1142 kilometrojn longa kaj trapasas kelkajn montarojn. La linio havas 45 staciojn kaj la plej alta, Tanggula, situas 5068 metrojn super la marnivelo. La fervojo havos grandan influon al la evoluo de Tibeto.

Adem Jakupović

Grava agnosko de la internacia E-movado al serba esperantisto



Dum la okazo de la 91-a Universala E-kongreso en Florenco (Italio) konata serba esperantisto Simo Milojević el Beograd ricevis tre gravan premion „Deguĉi” kiel agnoskon por lia antaŭenigo de internacia amikeco. Premio „Deguĉi” valora ĉirkaŭ 2.000 eŭroj havas kiel celon regulan subtenon de la plej gravaj aktivuloj kaj projektoj sur la kampo de uzado de Esperanto kiel ilon por fortigo de la monda paco kaj feliĉo de la homaro surbaze de la ideoj de aŭtoro de Esperanto Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj deziroj de aŭtoroj de la premio japana movado „Deguĉi Onisaburo”.

Krom tio, la celo de ĉi tiu premio estas agnosko al la homoj kiuj en sia plurjara aktiveco maksimume helpis la realigon de bazaj celoj de la internacia Esperanto-movado (UEA) kies statuto invitas al plifortigo de la sento de solidareco inter siaj membroj instigante ĉe ili komprenadon kaj estimon de aliaj popoloj. La premio estas kreita en la jubilea jaro 1987 kiel donaco de religia japana movado „Oomoto” kaj pri ĝia agnosko decidas komitato de UEA.

Ĉi jara gajninto de la premio „Deguĉi” estas konata serba esperantisto Simo Milojević, naskita en la jaro 1936 en BiH. Gimnazion li finis en Zemun (nun parto de Beograd) kaj poste li studis literaturon en Beograd, laboris kiel arma oficisto en Zemun, dediĉinte sin poste profesie al Esperanto-movado.

En tiu senco li estis sekretario de Jugoslavia Esperanto ligo (JEL), ĉefa redaktoro de ĝia gazeto „La Suda Stelo”, gvidis multnombrajn kursojn de Esperanto kaj estis tre aktiva membro de Esperanto societoj en Beograd kaj Zemun. En la jaro 1964 li gajnis Ordenon por meritoj de JEL. Kune kun Tibor Sekelj li estis unu el pioniroj de Esperanto-movado en Nepalo instruante longan tempon Esperanton en ĝia ĉefurbo Katmandu. Dank' al tiu aktiveco UEA akceptis Nepalajn E-ligon kiel regulan membron dum la kongreso en Florenco.

Dum sepdekaj jaroj Simo Milojević komencis labori en la Centra oficejo de UEA, plurajn jarojn li estis redaktoro de la revuo „Esperanto” kaj en la jaro 1983 li transprenis rolon de ĝenerala direktoro de UEA. De la jaro 1996 ĝis la emeritiĝo en la jaro 2002 li aktivis kiel bibliotekisto de UEA. Ĉiu okaze dum tri jardekoj li praktike estis unu el la ĉefaj motoroj de UEA kaj de internaciaj E-kongresoj.

m-ro Gvozden Sredić



Ni gratulas al nia anino Katarina Pigl, kuracistino, kiu la 7-an de oktobro 2006 edziniĝis al Gavan Fantom denaska esperantisto el Londono.

La edziĝfestoj okazis en malnova kastelo apud Londono. La feston ĉeestis ŝiaj gepatroj kaj fratino Ana. Vivu ili en harmonio kaj feliĉo!

Esperanto-kurso

Почињемо да објављујемо уџбеник есперанта који је написао наш уважени есперантиста Бориша Милићевић. Уџбеник ће бити објављиван у више наставака.

Предговор

Овај приручник је покушај да се попуни празнина која се годинама осећа на подручју практичног учења међународног језика есперанта. Наиме, већина уџбеника есперанта веома је брзо прелазила на обимније текстове без довољно конкретних примера употребе одређених језичких односно граматичких појмова. Зато се често дешавало да се почетник уплаши и одустане од учења. Осим тога, у досадашњим приручницима није довољно истакнута самостална употреба предмета (префикса) и додатака (суфикса), као и огромна могућност извођења и слагања две или више речи и речца.

Све то сам имао у виду радећи на овом приручнику. Настојао сам и да укажем на разлике између есперанта и српског језика колико ми је то простор допустио.

Може бити недостатак приручника то што нема на крају абecedно сређен речник есперанто-српски. Међутим, скоро све примере сам превео на српски језик, а уз сваку лекцију сам додао и превео речи које се у њој јављају као непознате, и тиме омогућио кориснику приручника да боље односно брже усваја градиво не губећи време у тражењу речи далеко од текста лекције. За све даље увежбавање есперантског говора ионако је потребан речник.

Након шест издања овог уџбеника у облику скрипата одлучио сам да га у извесној мери прерадим прилагођавајући га још више сврси за коју је написан – експресним курсевима.

Б. Милићевић

ПРВИ ДЕО

Абецеда

У међународном језику есперанту важи Вуково начело „пиши као што говориш, а читај као што је написано“.

Абецеда есперанта се састоји од 28 слова од којих су 5 самогласници а 23 сугласници.

Самогласници се пишу и читају исто као у српском језику (а, е, и, о, у).

17 сугласника се пише и изговара као у српском језику (b, c, d, f, g, h, j, k, l, m, n, p, r, s, t, v, z).

4 сугласника се пишу различито, али се изговарају исто као у српском језику:

ĉ као ч	ĉeko	- чек
ĝ као џ	ĝino	- џин
ĵ као ж	ĵurnalo	- новине, журнал
ŝ као ш	ŝalo	- шал

Остају нам још два слова ĥ и ŭ.

Сугласник ĥ се изговара као јако х, као у нашој речи хрт.

ĥaoso – haos

Он се замењује са к, изузев у неколико речи:

ĥaoso – kaoso

ĥemio – kemio (хемија)

Али ĥoro – хор не може да се пише као кого, јер ово значи срце, већ се продужује у koruso.

Исто тако, ĥano – кан не може бити капо, јер ово значи трска.

У речи ĥino – Кинез слово ĥ је замењено словом ĉ те имамо ĉino.

Слово ŭ (кратко у) увек чини слог са неким самогласником и изговара се једним испуштањем гласа:

ĵaŭdo	- четвртак	hieraŭ	- јуче
aŭto	- ауто(мобил)	hodiaŭ	- данас
ankaŭ	- такође	morgaŭ	- сутра
ankoraŭ	- још	baldaŭ	- ускоро

Абецеда есперанта у целини гласи:

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

∴

Нагласак (акцент)

Нагласак свих речи есперанта је увек на претпоследњем слогу, али се не пише.

dato	- датум
Danubo	- Дунав
Esperanto	- есперанто
Serbio	- Србија

∴

Вежба – ekzerco

amatoro, aŭgusto, biblioteko, broŝuro, cigaredo, civilizacio, ĉampiono, ĉefo, delegacio, debato, elektro, elemento, fabriko, formo, galerio, gimnazio, ĝirafo, higieno, ĥano, ideo, informo, jogurto, junio, ĵurnalo, kafo, kliento, laciono, loterio, materialo, muziko, nacio, naturo, objekto, oceano, papero, pasporto, regiono, respubliko, sandviĉo, sekretario, ŝako, ŝanco, taksio, televido, universitato, vazo, violono, zoologio.

∴

Bonan matenon!	- Добро јутро!
Bonan tagon!	- Добар дан!
Bonan vesperon!	- Добро вече!
Bonan nokton!	- Лаку ноћ!
Saluton!	- Здраво!
Ĝis la revido	- Довиђења
Bonan apetiton!	- Пријатно!
Dankon	- Хвала

Поновите ове примере наглашавајући претпоследњи слог!

∴

Наставиће се

Amuzo

Ezopo kaj vojaĝanto

Foje Ezopo, la fama aŭtoro de fabeloj, renkontis vojaĝanton. Tiu salutis lin kaj demandis:

— Kiom da tempo mi bezonos por atingi la urbon?

— Iru — respondis Ezopo.

— Mi scias bone, — diris la fremdulo — ke mi devas iri por alveni tien, sed diru al mi, kiom da horoj mi bezonas.

— Iru, — ripetis al li Ezopo/

— Mi vidas, — pensis la vojaĝanto — ke li estas malsaĝulo. Mi ne plu demandos lin.

Kaj li ekiris.

Post iom da tempo Ezopo ekkriis:

— Ho, haltu! Unu vorton! ... Vi alvenos tien post du horoj.

La vojaĝanto haltis kaj demandis, kiel Ezopo nun scias, ke li bezonas du horojn.

— Ĉar mi ne povis tion diri ne vidinte kiom rapide vi iras.

Michelangelo kaj urbestro

La famega skulptisto Michelangelo Buonarroti, fininte sian belan statuon de Davido, staris apud la statuo, kiam alvenis la urbestro de Florenco, kiu kredis sin spertulo pri la arto. Rigardinte la statuon tiu diris al la skulptisto, ke ĝi ja estas bela, sed ke al li ne plaĉas la nazo, kiu ŝajnis esti tro longa.

Michelangelo pacience supreniris ŝtupetaron tenante en la mano iomete da marmora polvo. Ŝajnigante, ke li laboras ĉe la nazo, li iom post iom faligis la polvon. Malsuprenirinte li demandis al la urbestro, ĉu tio plibeligis la statuon.

„Tio multe pli plaĉas al mi,“ respondis tiu, „nun vi vere donis al ĝi la vivon.“

In memoriam

La 8-an de julio ĉi-jare forpasis nia fervora esperantisto **Stevan Rađenović**. Li estis diplominta ekonomiisto naskiĝinta en 1922 proksime de Drvar (en Osredci). Li esperantistiĝis en 1940. Li estis fervora aktivo, precipe post 1976 en JEL, SEL kaj beogradaj societoj. Dum diversaj E-kongresoj en Beograd li estis fervora kunlaboranto kaj helpanto. Kun s-ano M. Kocić li verkis Esperanto-serban vortareton kun 1000 vortoj. Lia fervora agado estis instigo al junaj generacioj.

Liaj agoj restu neforgesitaj.





92-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Jokohamo, Japanio

de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007

SAT-kongreso okazos en Ecole Centrale, Ĉatenezo-Malabrio (Chatenay-Malabry), Francio. La kongreso okazos inter la 21-a kaj la 28-a de julio 2007.

La 59-a kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio) okazos en Parizo, Francio de la 12-a ĝis la 19-a de majo 2007.

La 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-unio okazos en Maribor, Slovenio de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007.